

HENRIK IBSEN

KONSTRUESTRO SOLNESS

(Byggmester Solness)

(1892)

Tradukita de Odd Tangerud

1997

Eldonejo: Jec Scandinavia a/s

Postboks 54, N - 3401 Lier

Tlf.. 32 85 50 03. Fax. 32 85 50 82

ISBN 82-91707-62-6

KONSTRUESTRO SOLNESS

ROLOJ:

- KONSTRUESTRO HALVARD SOLNESS.
- SINJORINO ALINE SOLNESS, lia edzino.
- DOKTORO HERDAL, familia kuracisto.
- KNUT BROVIK, antaŭa arkitekto, nun asistanto ĉe Solness.
- RAGNAR BROVIK, lia filo, desegnisto.
- KAJA FOSLI, lia nevino, librotenistino.
- FRAŬLINO HILDE WANGEL.
- KELKAJ SINJORINOJ.

- HOMAMASO SUR LA STRATO.

(La litero *ø* prononciĝas kiel franca *eu* aŭ germana *oe*)

(La agado havas lokon en la domo de **konstruestro Solness.**)

UNUA AKTO

(Simple ekipita laborĉambro ĉe konstruestro Solness. Duflugila pordo en la muro maldekstre kondukas al la antaŭĉambro. Dekstre estas la pordo al la internaj ĉambroj de la domo. En la fonmuro estas malferma pordo al la desegnejo. Antaŭe maldekstre estas pupitro kun libroj, paperoj kaj skribiloj. Kontraŭe al la pordo estas forno. En la angulo dekstre estas sofo kun tablo kaj kelkaj seĝoj. Sur la tablo estas akvokarafo kaj glaso. Pli malgranda tablo kaj balancseĝo kaj apogseĝo en la antaŭo dekstre. Eklumigitaj laborlampoj sur la tablo en la desegnejo, sur la tablo en la angulo kaj sur la pupitro.)

(En la desegnejo sidas Knut Brovik kaj lia filo Ragnar okupataj pri konstruaĵoj kaj kalkuloj. Ĉe la pupitro en la laborĉambro staras Kaja Fosli skribante en la ĉeflibron. Knut Brovik estas maljuna, maldika viro kun blanka hararo kaj barbo. Li estas vestita en iom uzita sed bone tenita nigra mantelo. Li portas okulvitrojn kaj blankan, iom flaviĝintan koltukon. Ragnar Brovik estas en la tridekjaroj, bele vestita, helhara, kun iom klina pozo. Kaja Fosli estas maldika, juna knabino de iom pli ol dudek jaroj, zorge vestita, sed de malsaneca aspekto. Ŝi havas verdan ŝirmilon super la okuloj. — Ĉiuj tri laboras iom da tempo en silento.)

KNUT BROVIK

(subite, kvazaŭ en timo, rektigas sin ĉe la desegnotablo, suspiras peze kaj pene dum li iras al la pordaperturo) Ne, nun mi baldaŭ ne plu eltenos!

KAJA

(iras al li) Ĉu estas pli malbone ĉi-vespere, onklo?

BROVIK

Ho, ŝajnas al mi, ke plimalboniĝas tagon post tago.

RAGNAR

(ekstaris kaj proksimiĝas) Vi devus iri hejmen, patro. Provu iomete dormi —

BROVIK

(senpacience) Enlitiĝi, ĉu? Ĉu vi deziras, ke mi tute sufokiĝu!

KAJA

Sed faru almenaŭ etan promenadon.

RAGNAR

Jes, faru. Mi akompanos vin.

BROVIK

(impete) Mi ne foriros antaŭ ol li venas! Ĉi-vespere mi alparolos lin rekte — (subpreme kolera) al li — la ĉefo.

KAJA

(en timo) Ho ne, onklo, — nepre atendu pri tio!

RAGNAR

Jes, atendu do, patro!

BROVIK

(spiras pene) Hah, — hah —! Mi, mi vere ne havas tempon atendi multe pli longe.

KAJA

(aŭskultante) Tŝ! Jen mi aŭdas lin malsupre sur la ŝtuparo!

(Ĉiuj tri reiras al sia laboro. Mallonga silento.)

(Konstruestro Halvard Solness envenas tra la antaŭĉambra pordo. Li estas iom aĝa, sana kaj forta, kun dense tondita, krispa hararo, malhelaj lipharoj kaj malhelaj, dikaj brovoj. Li portas grizeverdan, butonumitan jakon kun nefleksebla kolumo kaj largaj refaldaĵoj. Sur la kapo li havas molan, grizan feltĉapon, kaj sub la brako kelkajn paperujojn.)

KONSTRUESTRO SOLNESS

(ĉe la pordo, montras al la desegnoj kaj demandas flustre) Ĉu ili eliris?

KAJA

(mallaŭte, skuante la kapon) Ne. (Ŝi deprenas la okulŝirmilon.)

(Solness iras antaŭen sur la planko, ĵetas sian ĉapelon sur seĝon, metas la ujojn sur la tablon apud la sofo, kaj denove proksimiĝas al la pupitro. **Kaja** senhalte skribas, sed aspektas nerve maltrankvila.)

SOLNESS

(laŭte) Kion vi tie enskribas, fraŭlino Fosli?

KAJA

(ekskuiĝas) Ho, estas nur io, kio —

SOLNESS

Vidigu, fraŭlino. (klinas sin super ŝin, pretendante rigardi en la ĉeflibron, kaj flustras) Kaja?

KAJA

(skribante; mallaŭte) Jes?

SOLNESS

Kial vi ĉiam deprenas tiun ŝirmilon, kiam mi venas?

KAJA

(kiel antaŭe) Ĉar mi aspektas malbele kun ĝi.

SOLNESS

(ridetas) Kaj *tion* do ne *volas*, Kaja?

KAJA

(ekrigardas al li) Por nenio en la mondo. Ne en *viaj* okuloj.

SOLNESS

(karesas milde ŝian hararon) Kompatinda, kara, eta Kaja —

KAJA

(klinas la kapon) TŜ, — ili povas aŭdi vin!

(**Solness** paŝadas trans la plankon dekstren, turnas sin kaj haltas apud la pordo de la desegnejo.)

SOLNESS

Ĉu iu venis por konsulti min?

RAGNAR

(ekstaras) Jes, la juna paro, kiu deziras konstruigi la vilaon ekstere sur Løvstrand.

SOLNESS

(grumblante) Nu *ili*? *Ili* devas atendi. Mi ankoraŭ ne sufiĉe pripensis la planon.

RAGNAR

(pli proksime, iom hezitante) Urgas por ili ekhavi la desegnaĵojn.

SOLNESS

(kiel antaŭe) Jes, je Dio, — *tion* volas ja ĉiuj!

BROVIK

(ekrigardas) Ĉar ili forte sopiras transloĝiĝi en propran domon, ili diris.

SOLNESS

Nu ja; jes ja. *Tion* ni ja scias! Kaj ili akceptas kion ajn. Kontentaj pri tia aŭ tia loĝejo.

Nur ia restadejo. Sed nenia hejmo. Ne dankon! Ke ili turnu sin al iu alia. Diru *tion* al ili, kiam ili revenos.

BROVIK

(puŝas la okulvitrojn supren al la frunto, kaj ekrigardas lin surprizite) Al iu alia? Ĉu vi volus fordoni tiun laboron?

SOLNESS

(senpacience) Jes, jes, jes, je diablo! Se tiel estu —. Prefere tio ol konstrui sencele en la aero. (ekkrie) Ĉar mi ja apenaŭ konas tiujn homojn!

BROVIK

La homoj estas sufiĉe solidaj. Ragnar konas ilin. Li vizitadas la familion. Tre solidaj homoj.

SOLNESS

Ho, solidaj, — solidaj! Ne temas ja pri *tio*. Je Dio, — ĉu eĉ ne vi komprenas min? (impete) Mi ne volas implikiĝi en io kun tiuj fremdaj homoj. Ke ili turnu sin al kiu ajn!

BROVIK

(ekstaras) Ĉu *tio* estas via sincera opinio?

SOLNESS

(moroze) Jes, estas. — Definitive. (Li paŝadas antaŭen tra la ĉambro.)

(**Brovik** interŝanĝas ekrigardon kun **Ragnar**, kiu faras avertan geston. Poste li iras en la antaŭan ĉambron.)

BROVIK

Permesu al mi paroli kelkajn vortojn kun vi?

SOLNESS

Bone.

BROVIK

(al **Kaja**) Eniru *tien* dume, vi.

KAJA

(timeme) Ho, sed onklo —

BROVIK

Faru kiel mi diras, infano. Kaj fermu la pordon post vi.

(**Kaja** iras hezitante en la desegnejon, ekrigardas timeme kaj pete al **Solness**, kaj fermas la pordon.)

BROVIK

(iom mallaŭte) Mi ne volas, ke la infanoj sciu, kiel malbone statas pri mi.

SOLNESS

Jes, vi vere aspektas malsane nuntempe.

BROVIK

Pri mi estas baldaŭ finite. La fortoj malkreskas — de tago al tago.

SOLNESS

Sidu iomete.

BROVIK

Dankon, — se mi rajtas?

SOLNESS

(tiras la apogseĝon pli konvena) Jen. Bonvolu. — Nu?

BROVIK

(kun peno eksidas) Jes, estas tio pri Ragnar. Estas *tio*, kio estas la plej premiga. Kio fariĝos el li?

SOLNESS

Via filo, li kompreneble restos ĉi tie ĉe mi tiom longe, kiom li deziras.

BROVIK

Estas ja ĝuste *tio*, kion li ne volas. Trovas ke li ne povas — nun ne plu.

SOLNESS

Nu, li havas ja bonajn kondiĉojn, mi opinius. Sed se li postulus pli, mi ne estus malinklina al —

BROVIK

Ne, ne! Tute ne temas pri *tio*. (senpacience) Sed li devas iam havi okazon labori memstare, ankaŭ li!

SOLNESS

(ne lin rigardante) Ĉu vi opinias, ke Ragnar havas talentojn necesajn por tio?

BROVIK

Ne, *jen* la teruraĵo — ke mi komencis dubi pri la knabo. Ĉar vi ja neniam diris eĉ —

eĉ unu solan kuraĝigan vorton pri li. Sed tamen ŝajnas al mi, ke nenio alia eblas. *Devas* esti talentoj en li.

SOLNESS

Nu, sed li ja nenion lernis — tiel funde. Escepte desegni.

BROVIK

(rigardas lin kun kaŝa malamo kaj diras raŭke:) Ankaŭ *vi* ne multe estis lerninta pri la fako, kiam *vi* servis ĉe mi. Sed *vi* tamen ekkomencis, *vi*. (spiras peze) Kaj progresis. Kaj superis min kaj — kaj multajn aliajn.

SOLNESS

Jes, vidu, — fariĝis tiel por *mi*.

BROVIK

Vi pravas. Ĉio fariĝis por *vi*. Sed *vi* do ne havas koron por lasi min iri tombejen — sen vidi por kio Ragnar taŭgas. Kaj mi ankaŭ dezirus vidi ilin geedziĝintaj — antaŭ ol mi forpasos.

SOLNESS

(akre) Ĉu estas ŝi, kiu tion volas?

BROVIK

Ne tiom Kaja. Sed Ragnar priparolas tion ĉiun tagon. (pete) Vi *devas*, — *vi devas* helpi lin al iu memstara laboro nun! Mi *devas* vidi ion, kion la knabo faris. Ĉu *vi* aŭdas?

SOLNESS

(kolere) Sed, je la diablo, mi ne povas tiri mendojn por li de la luno!

BROVIK

Ĝuste nun li povas ekhavi bonan mendon. Grandan laboron.

SOLNESS

(maltrankvila, ekmire) Ĉu *li*?

BROVIK

Se *vi* donus vian konsenton.

SOLNESS

Kia laboro estas *tiu*?

BROVIK

(iom hezite) Li povos konstrui tiun vilaon tie sur Løvstrand.

SOLNESS

Tiun! Sed ĝin mi ja mem konstruos!

BROVIK

Ho, *vi* ja ne vere emas.

SOLNESS

(ekkoleras) Ne emas! Mi! Kiu kuraĝas diri tion?

BROVIK

Vi ja mem ĵus diris.

SOLNESS

Ho, ne atentu kion mi tiel — *diras*. — Ĉu ili petis al Ragnar konstrui la vilaon?

BROVIK

Jes. Li ja konas la familion. Kaj li faris, — nur pro amuziĝo — faris desegnaĵojn kaj kalkulon kaj la kromon —

SOLNESS

Kaj pri la desegnaĵoj ili estas kontentaj? Tiuj kiuj loĝos tie?

BROVIK

Jes. Se vi nur volus trarigardi ilin kaj aprobi, ili —

SOLNESS

Ili volus igi Ragnar konstrui la hejmon por si?

BROVIK

Ege plaĉis al ili, kion li prezentis. Ŝajnis al ili ke estas io tute nova. Jen kion ili diris.

SOLNESS

Hoho! *Nova*! Ne tia eksmoda senvaloraĵo, kian *mi* kutimas konstrui!

BROVIK

Ŝajnis al ili, ke estas io *alia*.

SOLNESS

(en subpremata kolero) Do estis pro Ragnar, ke ili venis — dum mi estis for!

BROVIK

Ili venis por vin saluti. Kaj demandi, ĉu vi estus volema retiri vin —

SOLNESS

(ekkoleras) Retiri min! Mi!

BROVIK

Se vi trovus, ke la desegnaĵoj de Ragnar —

SOLNESS

Mi! Retiri min por via filo!

BROVIK

Retiri vin de la interkonsento, ili pensis.

SOLNESS

Ho, tio ja estas la sama. (ridas kolere) Nu, ĉu tiel! Halvard Solness, — li nun komencu retiri sin! Doni lokon al tiuj, kiuj estas pli junaj. Al la plej junaj, eble! Nur doni lokon! Lokon! Lokon!

BROVIK

Je Dio, estas ja loko por pli ol nur unu sola —

SOLNESS

Ho, ne estas tiel *ege* sufiĉa loko ĉi tie. Nu, pri *tio* estu kiel estu. Sed mi neniam retiros min! Neniam cedos al kiu ajn! Neniam libervole. Neniam je mia vivo mi *tion* faros!

BROVIK

(ekstaras pene) Mi do eliru el la vivo sen trankvilo? Sen ĝojo? Sen fido kaj kredo pri Ragnar? Sen vidi unu solan verkon de li? Ĉu tion mi faru?

SOLNESS

(duone turnas sin flanken kaj murmuras) Hm, — ne plu demandu.

BROVIK

Jes, respondu pri *tio*. Ĉu mi eliru el la vivo tute mizera?

SOLNESS

(aspekte luktas kun si mem; fine li diras per mallaŭta, sed firma voĉo) Vi iru el la vivo tiel, kiel vi laŭ eblecoj scias kaj povas.

BROVIK

Do, tiel estu. (li paŝas trans la plankon)

SOLNESS

(postiras, duone malespera) Mi ja ne *povas* alie, komprenu! Mi ja *estas* kia mi *estas*!
Kaj *rekrei* min mem mi ja ne povas!

BROVIK

Ne, ne, — vi eble ne povas. (ŝancelas kaj haltas apud la sofotablo) Permesu al mi glason da akvo?

SOLNESS

Bonvolu. (verŝas kaj etendas al li la glason)

BROVIK

Dankon. (trinkas kaj demetas la glason)

(**Solness** iras kaj malfermas la pordon al la desegnejo.)

SOLNESS

Ragnar, — vi devas akompani vian patron hejmen.

(**Ragnar** ekstaras rapide. Li kaj **Kaja** venas en la laborejon.)

RAGNAR

Kio estas, patro?

BROVIK

Prenu min sub la brako. Kaj ni iru.

RAGNAR

Jes bone. Vestu vin ankaŭ vi, Kaja.

SOLNESS

Fraŭlino Fosli devas resti. Nur momenton. *Mi* havas leteron skribendan.

BROVIK

(rigardas al **Solness**) Bonan nokton. Dormu bone — se vi povos.

SOLNESS

Bonan nokton.

(**Brovik** kaj **Ragnar** eliras tra la antaŭĉambra pordo. **Kaja** iras al la pupitro. **Solness** staras kun klinita kapo dekstre apud la apogseĝo.)

KAJA

(necerta) Ĉu estas letero —?

SOLNESS

(mallonge) Ne, kompreneble ne. (rigardas ŝin severe) Kaja!

KAJA

(timeme, mallaŭte) Jes?

SOLNESS

(montras ordone per la fingro al la planko) Venu ĉi tien! Tuj!

KAJA

(hezite) Jes.

SOLNESS

(kiel antaŭe) Pli proksimen!

KAJA

(obeas) Kion vi volas?

SOLNESS

(rigardas ŝin momenton) Ĉu estas *vi*, kiun mi devas danki por tio ĉi?

KAJA

Ne, ne, tion ne kredu!

SOLNESS

Sed edziniĝi, — tion vi ja nun volas.

KAJA

(mallaŭte) Ragnar kaj mi estas gefianĉoj kvar — kvin jarojn, kaj tial —

SOLNESS

Kaj vi opinias, ke tio devas havi finon. Ĉu tiel estas?

KAJA

Ragnar kaj onklo diras, ke mi *devas*. Kaj tial mi ja devas cedi.

SOLNESS

(pli indulge) Kaja, ĉu vi ne tamen iomete amas Ragnar?

KAJA

Mi foje multe amis Ragnar. — Antaŭ ol mi venis al vi.

SOLNESS

Sed nun ne plu? Tute ne?

KAJA

(pasie, plektas la manojn antaŭ li) Ho, vi ja scias, ke nun mi nur amas unu solan! Neniun alian en la tuta mondo. Neniam amos aliulon!

SOLNESS

Jes, tiel vi parolas. Kaj tamen vi foriros de mi. Lasos min sidi sola kun ĉio!

KAJA

Sed ĉu mi ne povus resti ĉe vi, eĉ se Ragnar —?

SOLNESS

(rifuzante) Ne, ne, tio tute ne eblas. Se Ragnar foriros, kaj komencos labori memstare, li ja mem bezonos vin.

KAJA

(tordas la manojn) Ho, ŝajnas al mi, ke mi ne *povas* disiĝi de vi! Estas ja tute, tute neeble, mi pensas!

SOLNESS

Do zorgu, ke Ragnar forlasos tiujn stultajn ideojn. Edziniĝu al li se vi volas — (ŝanĝas tonon) persvadu lin resti en sia bona ofico ĉe mi. Tiel mi ja povas retenigi ankaŭ *vin*, kara Kaja.

KAJA

Ho jes, kiel belege estus, se povus tiel aranĝiĝi!

SOLNESS

(kaptas ŝin per ambaŭ manoj ĉe la kapo kaj flustras) Ĉar mi ne *povas* esti sen vi, komprenu. Devas havi vin ĉe mi ĉiun tagon.

KAJA

(nervoze ravita) Ho Dio! Ho Dio!

SOLNESS

(kisas ŝian hararon) Kaja, — Kaja!

KAJA

(genuas antaŭ li) Ho kiel bona vi estas al mi! Kiel nedireble bona!

SOLNESS

(impete) Ekstaru! Ekstaru do, je diab—! Ŝajnas al mi, ke iu venas! (helpas ŝin ekstari. Ŝi ŝancelas al la pupitro.)

(**SinJORINO Solness** aperas ĉe la pordo dekstre. Ŝi aspektas magre kaj kun ĉagrenoj, kun ioma spuro de pasinta beleco. Blondaj, pendantaj bukloj. Elegante, nigre vestita. Parolas iom malrapide kaj per plendanta voĉo.)

SINJORINO SOLNESS

(ĉe la pordo) Halvard!

SOLNESS

(turnas sin) Ho, ĉu vi, kara —?

SINJORINO SOLNESS

(kun rigardo al **Kaja**) Mi venas al ĝeno, mi komprenas.

SOLNESS

Tute ne. Fraŭlino Fosli nur skribos ankoraŭ letereton.

SINJORINO SOLNESS

Jes, tion mi vidas.

SOLNESS

Kion vi do volas de mi, Aline?

SINJORINO SOLNESS

Mi nur volas diri, ke doktoro Herdal sidas en la angulĉambro. Ĉu eble ankaŭ vi envenos, Halvard?

SOLNESS

(rigardas ŝin suspekteme) Hm, — ĉu la doktoro nepre volas paroli kun mi?

SINJORINO SOLNESS

Ne precize nepre. Li venis al mi vizite. Kaj kompreneble li deziras saluti vin samtempe.

SOLNESS

(ridas silente) Mi imagas tion, jes. Nu, vi do petu lin iomete atendi.

SINJORINO SOLNESS

Kaj vi do venos al li iom poste?

SOLNESS

Eble poste, — poste, kara. Post iom.

SINJORINO SOLNESS

(kun denova rigardo al **Kaja**) Nu, ne forgesu do, Halvard. (retiras sin kaj fermas la pordon post si)

KAJA

(mallaŭte) Ho Dio, ho Dio, — la sinjorino certe pensas ion malbonan pri mi!

SOLNESS

Tute ne. Almenaŭ ne pli ol ordinare. Sed tamen estas pli bone, ke vi nun foriru, Kaja.

KAJA

Jes, jes, nun mi *devas* foriri.

SOLNESS

(severe) Kaj vi metos tion alian en ordo por mi. Ĉu vi aŭdas?

KAJA

Ho, se vere dependus nur de *mi* —

SOLNESS

Mi *volas* havi tion en ordo, mi diras! Kaj jam morgaŭ!

KAJA

(timeme) Se ne eblas alimaniere, mi volonte rompos la fianĉecon.

SOLNESS

(ekscite) Rompi la fianĉecon! Ĉu vi estas freneza! Vi volas rompi —?

KAJA

(malespere) Jes, prefere tion. Ĉar mi *devas*, — mi *devas* resti ĉe vi! Ne *povas* foriri de vi! Estas tiel — tiel tute neeble!

SOLNESS

(ekflamiĝas) Sed, je diablo, — kaj Ragnar! Estas ja ĝuste Ragnar kiun mi —

KAJA

(rigardas lin per timigitaj okuloj) Ĉu estas precipe pro Ragnar, ke — ke vi —?

SOLNESS

(regas sin) Ho ne, certe ne! Vi do nenion komprenas. (milde kaj mallaŭte) Kompreneble estas *vi*, kiun mi deziras havi. Unue vi, Kaja. Sed ĝuste tial vi devas persvadi ankaŭ Ragnar, ke li restu en la okupo. Nu, nu, — iru nun hejmen.

KAJA

Jes, jes, bonan nokton do.

SOLNESS

Bonan nokton. (kiam ŝi estas elironta) Aŭskultu! Ĉu la desegnaĵoj de Ragnar estas tie ene?

KAJA

Jes, mi ne vidis ke li kunprenis ilin.

SOLNESS

Do, eniru, kaj trovu ilin por mi. Eble mi povus tamen trarigardi ilin.

KAJA

(ĝoja) Ho jes, faru tion!

SOLNESS

Pro vi, kara Kaja. Nu, rapidu por trovi ilin!

(**Kaja** rapidas en la desegnejon, serĉas timeme en la tirkesto, eltrovas dokumentujon kaj alportas ĝin.)

KAJA

Jen ĉiuj desegnaĵoj.

SOLNESS

Metu ilin tien sur la tablon.

KAJA

(demetas la ujon) Bonan nokton, do. (pete) Kaj pensu bone kaj ĝentile pri mi.

SOLNESS

Ho, tion mi ja ĉiam faras. Bonan nokton, kara eta Kaja. (ekrigardas dekstren) Do foriru!

(**SinJORINO Solness** kaj **doktoro Herdal** venas tra la pordo dekstre. Li estas iom aĝa, diketa sinjoro kun ronda, memkontenta vizaĝo, senbarba, kun maldensa, hela hararo, kaj portas orajn okulvitrojn.)

SINJORINO SOLNESS

(ankoraŭ ĉe la pordo) Halvard, mi ne povas plu reteni la doktoron.

SOLNESS

Nu, do venu ĉi tien.

SINJORINO SOLNESS

(al **Kaja**, kiu estingas la pupitran lampon) Vi jam finis la leteron, fraŭlino?

KAJA

(konfuzita) La leteron —?

SOLNESS

Jes, estis mallonga.

SINJORINO SOLNESS

Certe estis tre mallonga.

SOLNESS

Vi povas foriri, fraŭlino Fosli. Kaj revenu ĝustatempe morgaŭ.

KAJA

Mi faros. — Bonan nokton, sinjorino. (Ŝi eliras tra la antaŭĉambra pordo)

SINJORINO SOLNESS

Certe estas bone por vi, Halvard, ke vi ekhavis tiun fraŭlinon.

SOLNESS

Jes, efektive. Ŝi estas uzebla por io el ĉio, ŝi.

SINJORINO SOLNESS

Laŭŝajne ŝi estas.

DOKTORO HERDAL

Ankaŭ lerta en librotendo, ĉu?

SOLNESS

Nu, — ioman sperton ŝi ja akiris dum tiuj du jaroj. Kaj ŝi estas ĝentila kaj bonvolas fari kion ajn.

SINJORINO SOLNESS

Jes *tio* devas ja esti granda agrableco —

SOLNESS

Tiel estas. Precipe kiam oni ne estas dorlotita en tiu rilato.

SINJORINO SOLNESS

(milde riproĉe) Ĉu *tion* vi povas diri, Halvard?

SOLNESS

Ho ne, ne, kara Aline. Mi petas pardonon.

SINJORINO SOLNESS

Neniu kaŭzo. — Nu, doktoro, vi do revenos poste por trinki teon ĉe ni?

DOKTORO HERDAL

Tuj post la vizito al iu malsanulo mi venos.

SINJORINO SOLNESS

Tre afable. (Ŝi eliras tra la pordo dekstre.)

SOLNESS

Ĉu urĝas, doktoro?

DOKTORO HERDAL

Ne, tute ne.

SOLNESS

Ĉu ni iomete interparolu?

DOKTORO HERDAL

Jes, bonvole.

SOLNESS

Ni eksidu.

(Li montras por la doktoro lokon en la balancseĝo kaj mem eksidas en la apogseĝon)

SOLNESS

(rigardas lin explore) Diru al mi, — ĉu vi ion rimarkis pri Aline?

DOKTORO HERDAL

Nun, kiam ŝi estis ĉi tie, vi aludas?

SOLNESS

Jes. Rilate al *mi*. Ĉu vi ion rimarkis?

DOKTORO HERDAL

(ridetas) Jes, je diablo, — ne estis eviteble rimarki, ke via edzino, — hm —

SOLNESS

Nu?

DOKTORO HERDAL

— ke via edzino ne aparte ŝatas tiun fraŭlinon Fosli.

SOLNESS

Nenion alian? Tion mi ja mem rimarkis.

DOKTORO HERDAL

Kaj tio ja ne estas stranga.

SOLNESS

Kio?

DOKTORO HERDAL

Ke ŝi ne precipe ŝatas, ke vi tiel tagon post tago havas alian virinon ĉe vi.

SOLNESS

Ne, ne, vi eble pravas. Kaj ankaŭ Aline. Sed tiu afero, — ĝi ne povas esti alia.

DOKTORO HERDAL

Ĉu vi ne povas dungi oficiston?

SOLNESS

La unuan ulon sin prezentantan? Ne dankon, — per tio mi ne povas kontentiĝi.

DOKTORO HERDAL

Sed ĉar via edzino —? Tiel malforta, kia ŝi estas —. Ĉar ŝi ne eltenas vidi tion ĉi?

SOLNESS

Jes, je Dio, devas esti kiel estas — mi dirus. Mi *devas* reteni Kaja Fosli. Ne povas uzi iun alian ol ĝuste ŝin.

DOKTORO HERDAL

Neniun alian?

SOLNESS

(mallonge) Ne, neniun alian.

DOKTORO HERDAL

(tiras la seĝon pli proksimen) Aŭskultu nun, kara sinjoro Solness. Permesu al mi fari demandon en plena konfido.

SOLNESS

Jes, bonvolu.

DOKTORO HERDAL

La virinoj, vidu, — en certaj aferoj ili havas damnite bonan spurflaron —

SOLNESS

Ili ja havas. Certe. Sed —?

DOKTORO HERDAL

Nu. Do, aŭskultu. Ĉar via edzino tute ne povas toleri tiun Kaja Fosli —?

SOLNESS

Jes, kio do?

DOKTORO HERDAL

— ĉu ŝi ne havas ian — ian etan kaŭzon por tiu senvola maltoleremo?

SOLNESS

(rigardas lin kaj ekstaras) Hoho!

DOKTORO HERDAL

Ne ofendiĝu. Sed ĉu ŝi ne *havas*?

SOLNESS

(mallonge kaj decide) Ne.

DOKTORO HERDAL

Tute neniun kaŭzon do?

SOLNESS

Neniun alian kaŭzon ol sian propran suspektemon.

DOKTORO HERDAL

Mi scias, ke vi konis multajn virinojn dum via vivo.

SOLNESS

Jes, mi konis.

DOKTORO HERDAL

Kaj ankaŭ trovas kelkajn el ili allogaj.

SOLNESS

Ho jes, ankaŭ tio.

DOKTORO HERDAL

Sed en tio ĉi pri fraŭlino Fosli —? Do ne estas iu tiaĵo en tiu ĉi rilato?

SOLNESS

Ne. Nenio — de *mia* flanko.

DOKTORO HERDAL

Sed de ŝia?

SOLNESS

Pri tio mi opinias, ke vi ne rajtas demandi, doktoro.

DOKTORO HERDAL

Ni eliris de la spurflaro de via edzino.

SOLNESS

Ni ja faris. Kaj pri tio — (malaltigas la voĉon) La spurflaro de Aline, kiel vi diras, — ĝi en certa maniero eltenis la provon, ĝi.

DOKTORO HERDAL

Nu, — jen *jen*!

SOLNESS

(eksidas) Doktoro Herdal, — mi nun rakontos al vi pri stranga okazaĵo. Se vi do volas aŭskulti.

DOKTORO HERDAL

Mi volonte aŭskultas strangajn rakontojn.

SOLNESS

Nu, bone. Vi eble memoras, ke mi prenis Knut Brovik kaj la filon en mian servon, — kiam ege malprogresis por la maljunulo.

DOKTORO HERDAL

Pri tio mi estas ja informita, jes.

SOLNESS

Ĉar ili ja estas paro da lertuloj, tiuj du. Ili havas talentojn, ambaŭ siaflanke. Sed jen la filo ekpensis fianĉiĝi. Sekve, kompreneble, li volis edziĝi, — kaj komenci konstrui mem. Ĉar tiel ja pensas ili ĉiuj, la junuloj.

DOKTORO HERDAL

(ridas) Jes, ili havas tiun malbonan kutimon, ke ili volas kuniĝi.

SOLNESS

Nu. Sed pri tio *mi* ja ne povis esti kontenta. Ĉar mi ja mem bezonis Ragnar. Kaj ankaŭ la maljunulon. Li estas ja tre lerta por kalkuli porteblecon kaj volumon — kaj ĉiajn tiajn diablojaĵojn, li.

DOKTORO HERDAL

Nu ja, ankaŭ tio ja apartenas al la metio.

SOLNESS

Jes certe. Sed Ragnar, li volis absolute komenci memstare. Nenio malhelpis *tion*.

DOKTORO HERDAL

Sed li ja tamen restis ĉe vi.

SOLNESS

Jes, aŭdu nun. Unu tagon tiu Kaja Fosli venis en ilian desegnejon kun misio. Ŝi neniam antaŭe estis tie. Kiam mi vidis kiel kore ili ĉarmiĝis unu de la alia, mi ekhavis la penson, ke se mi povis dungi ŝin en la oficejo, eble Ragnar restus, ankaŭ li.

DOKTORO HERDAL

Estis ja komprenebla penso.

SOLNESS

Jes, sed tiam mi neniel aludis pri io tia. Nur staris ŝin rigardante — kaj ege deziris havi ŝin ĉi tie. Mi iomete afable parolis kun ŝi, — tiel pri sensignifaĵoj. Kaj poste ŝi foriris.

DOKTORO HERDAL

Nu?

SOLNESS

Sed la sekvan tagon, je la vespero, kiam Brovik kaj Ragnar estis irintaj hejmen, ŝi revenis al mi kaj kondukis kvazaŭ mi estus farinta interkonsenton kun ŝi.

DOKTORO HERDAL

Interkonsenton? Pri kio?

SOLNESS

Ĝuste pri *tio*, kion kaŝe mi estis dezirinta. Sed kion mi tute ne menciis eĉ per unu sola vorto.

DOKTORO HERDAL

Tre strange.

SOLNESS

Jes, ĉu ne? Kaj nun ŝi volis scii kion ŝi devus fari ĉi tie. Ĉu ŝi komencu tuj la sekvan matenon. Kaj tiel plu.

DOKTORO HERDAL

Ĉu vi ne opinias, ke ŝi tion faris por povi esti kune kun sia amanto?

SOLNESS

Ankaŭ *mi* havis tiun penson en la komenco. Sed ne estis tiel. De *li* ŝi kvazaŭ tute forglitis, — kiam ŝi estis establita ĉe mi.

DOKTORO HERDAL

Forglitis al vi do?

SOLNESS

Jes, komplete. Mi povas rimarki, ke ŝi sentas mian rigardon al si de malantaŭe. Ŝi tremas, eĉ se mi nur proksimiĝas al ŝi. Kion vi pensas pri *tio*?

DOKTORO HERDAL

Hm, — estas ja klarigeble.

SOLNESS

Nu, sed jen tio alia? Ke ŝi kredis ke mi estis dirinta al ŝi tion, kion mi nur volis kaj deziris — tiel silente. Interne. Por mi mem. Kion vi diras pri tio? Ĉu vi povas klarigi al mi tiaĵon, doktoro Herdal?

DOKTORO HERDAL

Ne, pri tiaĵoj mi ne okupas min.

SOLNESS

Tion mi antaŭsentus. Tial ĝis nun mi ne volis paroli pri tio. — Sed estas diable embarase laŭlonge, komprenu. Jen mi devas ĉiun tagon ŝajnigi kvazaŭ mi —. Kaj

estas ja bedaŭrinde por ŝi, la kompatindulino. (impete) Sed mi ne *povas* ion alian! Ĉar se *ŝi* forkuros de mi, — ankaŭ Ragnar foriros.

DOKTORO HERDAL

Kaj vi ne rakontis al via edzino la konekson en tio ĉi?

SOLNESS

Ne.

DOKTORO HERDAL

Sed, je Dio, kial vi ne faras?

SOLNESS

(fiksrigardas lin kaj diras mallaŭte) Ĉar ŝajnas al mi ke estas kvazaŭ — kvazaŭ ia bonfara memturmentado por mi en *tio*, ke Aline rajtas esti maljusta al mi.

DOKTORO HERDAL

(agitas la kapon) El tio ĉi mi komprenas eĉ ne dian vorteron.

SOLNESS

Jen vidu, — estas ja kvazaŭ iu partopago por senlima, senmezura ŝuldo —

DOKTORO HERDAL

Al via edzino?

SOLNESS

Jes. Kaj tio iomete malpezigas la konsciencon. Oni povas spiri iom pli libere momenton, komprenu.

DOKTORO HERDAL

Je Dio, ĉu mi vorton komprenas —

SOLNESS

(interrompas; denove ekstaras) Jes, jes, jes, — do ni ne plu parolu pri tio.

(Li paŝadas sur la planko, revenas kaj haltas ĉe la tablo.)

SOLNESS

(rigardas la doktoron kun ŝercema rideto) Certe ŝajnas al vi, ke vi lerte ekigis min rakonti, doktoro?

DOKTORO HERDAL

(iom ĉagrenita) Igis vin rakonti? Ankaŭ el tio mi nenion komprenas, sinjoro Solness.

SOLNESS

Ho, diru nur tute malkaŝe. Mi ja bone rimarkis tion, komprenu!

DOKTORO HERDAL

Kion vi rimarkis?

SOLNESS

(mallaŭte, malrapide) Ke vi afablas ĉi tie tenante okulon sur min.

DOKTORO HERDAL

Ĉu *mi*! Diable, kial mi *tion* farus?

SOLNESS

Ĉar vi kredas, ke mi — (ekscite) Nu, je diablo, — vi kredas la samon pri mi kiel Aline!

DOKTORO HERDAL

Kaj kion do *ŝi* kredas pri vi?

SOLNESS

(denove sinrega) Ŝi komencas kredi, ke mi estas tiel — tiel — malsana.

DOKTORO HERDAL

Malsana! *Vi*! Pri tio ŝi neniam eligis vivan vorton al mi. Kio do estus al vi, kara?

SOLNESS

(klinas sin sur la seĝdorson kaj flustras) Aline kredadas, ke mi estas freneza. *Jen* kion ŝi kredas.

DOKTORO HERDAL

(ekstaras) Sed kara bona sinjoro Solness —!

SOLNESS

Jes, je mia eterna savo —! Tiel estas. Kaj *tion* ŝi ankaŭ kredigis al *vi*! Ho, mi povas certigi vin, doktoro, — mi klare rimarkas tion el via sinteno. Ĉar tiel facile ne estas ruzi kontraŭ mi, vi sciu.

DOKTORO HERDAL

(rigardas lin en surprizo) Neniam, sinjoro Solness — neniam tian penson mi ekhavis.

SOLNESS

(kun malkredema rideto) Ĉu? Vere ne, ĉu?

DOKTORO HERDAL

Neniam! Kaj certe neniam via edzino. Pri tio mi opinias, ke mi povus ĵuri.

SOLNESS

Nu, pri tio vi prefere rezignus. Ĉar iamaniere, vidu, ŝi — ŝi eble havus kaŭzon por kredi ion tian.

DOKTORO HERDAL

Ne, nun mi vere devas diri —!

SOLNESS

(interrompante, elsvingas la manon) Bone, bone, kara doktoro, — ni tion ĉi ne pli profunde priparolu. Pli bone estas, ke ĉiu tenas sin al *la sia*. (ŝanĝas al silenta gajeco) Sed aŭskultu nun, doktoro — hm —

DOKTORO HERDAL

Jes?

SOLNESS

Ĉar vi tamen ne kredas, ke mi estas — tiel — malsana — aŭ freneza — kaj tiel plu —

DOKTORO HERDAL

Kion do, vi aludas?

SOLNESS

Tial vi certe imagas, ke mi estas treege feliĉa viro?

DOKTORO HERDAL

Ĉu *tio* do estus nura imago?

SOLNESS

(ridas) Ne, ne, — komprenu min! Je Dio! Imagu, — esti konstruestro Solness! Halvard Solness! Ho jes, dankon!

DOKTORO HERDAL

Jes, mi devas konfesi, ke al *mi* ŝajnas kvazaŭ la feliĉo sekvis vin en vere nekredebla grado.

SOLNESS

(subpremas sombran rideton) Ĝi faris. Mi ne povas plendi pri *tio*.

DOKTORO HERDAL

Unue ja brulis tiu malnova, terura rabistkastelo por vi. Kaj *tio* estis ja granda bonŝanco.

SOLNESS

(serioze) Estis la familia hejmo de Aline, kiu forbrulis. Memoru *tion*.

DOKTORO HERDAL

Jes, por *ŝi* tio certe estis peza aflikto.

SOLNESS

Ĝis hodiaŭ ŝi ne liberiĝis el ĝi. Eĉ ne post tiuj dek du — dek tri jaroj.

DOKTORO HERDAL

Kio sekvis poste certe estis la plej peza bato por ŝi.

SOLNESS

Io kun la alia.

DOKTORO HERDAL

Sed vi, — vi mem, — vi progresis pro tio. Komencis kiel malriĉa knabo el la kamparo, — kaj staras nun kiel la unua en via branĉo. Ho jes, sinjoro Solness, *vi* ja vere estis bonŝanca.

SOLNESS

(ekrigardas lin eviteme) Jes, sed estas ja ĝuste *tio*, kion mi tiel forte timas.

DOKTORO HERDAL

Timas? Ĉar la sukceso sekvas vin?

SOLNESS

Frue kaj malfrue mi timas, — timas. Ĉar iam la ŝanĝiĝo ja venos, komprenu.

DOKTORO HERDAL

Babilaĵo! De kie venos la ŝanĝiĝo?

SOLNESS

(firme kaj certe) Venos de la junularo.

DOKTORO HERDAL

Pa! La junularo! Vi ja ne estas eksmoda, vi, mi opinius. Ho ne, — Vi staras ja nun tiel solide ĉi tie, kiel neniam antaŭe.

SOLNESS

La ŝanĝiĝo venos. Mi antaŭsentas. Kaj mi vidas ĝin proksimiĝi. Iu komencas postuli: retiru vin por mi! Kaj ĉiuj la aliaj sturmas post li kaj minacas kaj krias: spacon — spacon — spacon! Jes, atentu nur, doktoro. Iam venos la junuloj frapante sur la pordon —

DOKTORO HERDAL

(ridetas) Nu, bona Dio, kio sekve?

SOLNESS

Kio sekve? Jes, tiam estos finite pri konstruestro Solness.

(Iu frapas la maldekstran pordon.)

SOLNESS

(skuiĝas) Kio *estas*? Ĉu vi aŭdis??

DOKTORO HERDAL

Iu frapis.

SOLNESS

(laŭte) Envenu!

(**Hilde Wangel** envenas tra la antaŭĉambra pordo. Ŝi estas meze alta, elasta kaj belstatura. Iom sunbruna. Vestita en turisma kostumo, kun suprenfiksita jupo, kaj etendita maristkolumo kaj maristĉapeto sur la kapo. Dorsosako, plejdo en rimeno kaj longa montar-bastono.)

HILDE WANGEL

(iras kun brilantaj, ĝojaj okuloj al **Solness**) Bonan vesperon!

SOLNESS

(rigardas ŝin necerte) Bonan vesperon —

HILDE

(ridas) Aspekto vi ne rekonas min!

SOLNESS

Ne, vere mi devas diri, ke — tiel en la momento —

DOKTORO HERDAL

(proksimiĝas) Sed *mi* rekonas vin, fraŭlino —

HILDE

(kontente) Ho, ĉu estas vi, kiu —!

DOKTORO HERDAL

Jes, certe estas mi. (al **Solness**) Ni renkontiĝis ĉi-somere supre en montodometo. (al **Hilde**) Kio do okazis pri la aliaj virinoj?

HILDE

Ho, ili prenis la vojon okcidenten, ili.

DOKTORO HERDAL

Certe ne plaĉis al ili la bruoj, kiun ni faris en la vespero.

HILDE

Ne, certe ili tion ne ŝatis.

DOKTORO HERDAL

(minacas per la fingro) Kaj ne estas eble nei, ke vi iomete koketis kun ni.

HILDE

Tio estis ja pli amuza, ol sidi trikante ŝtrumpojn kune kun tiuj virinoj.

DOKTORO HERDAL

(ridas) Mi tute samopinias kun vi!

SOLNESS

Ĉu vi venis al la urbo nun-vespere?

HILDE

Jes, mi ĵus venis.

DOKTORO HERDAL

Tute sola, fraŭlino Wangel?

HILDE

Jes!

SOLNESS

Wangel? Ĉu vi nomiĝas Wangel?

HILDE

(rigardas lin gaje, surprize) Kompreneble mi ja *tiel* nomiĝas.

SOLNESS

Vi do estas filino de la distrikta kuracisto en Lysanger?

HILDE

(kiel antaŭe) Jes, kies filino mi alie estus?

SOLNESS

Nu, ni do renkontiĝis *tie*. La someron, kiam mi konstruis turon sur la malnova preĝejo.

HILDE

(pli serioze) Jes, kompreneble tiam estis.

SOLNESS

Nu, estas longe de tiam.

HILDE

(rigardas lin firme) *Estas* nun precize tiuj dek jaroj de tiam.

SOLNESS

Kaj tiam vi estis nur infano, mi pensas.

HILDE

(pase rimarkante) Tamen dek du — dek tri jarojn.

DOKTORO HERDAL

Ĉu estas la unua fojo, ke vi vizitas ĉi tiun urbon, fraŭlino Wangel?

HILDE

Jes, vere estas.

SOLNESS

Kaj vi eble neniun konas ĉi tie?

HILDE

Neniun escepte vin. Jes, kaj vian edzinon.

SOLNESS

Nu, ankaŭ *ŝin* vi konas?

HILDE

Nur *iomete*. Ni estis kune kelkajn tagojn en la sanatorio —

SOLNESS

Nu *tie*.

HILDE

Ŝi diris, ke mi venu viziti ŝin, se mi venus ĉi tien en la urbon. (ridetas) Cetere inviti ne estus necese.

SOLNESS

Kaj ŝi neniam *tion* priparolis —

(**Hilde** metas la bastonon apud la fornon, malligas la dorsosakon kaj metas ĝin kaj la plejdon sur la sofon. **Doktoro Herdal** volas helpi ŝin. **Solness** staras ŝin rigardante.)

HILDE

(iras al li) Nu, do mi petas permeson resti ĉi tie ĉi tiun nokton.

SOLNESS

Tio certe bone eblas.

HILDE

Ĉar mi ne havas aliajn vestaĵojn ol tiujn, kiujn mi nun surhavas. Jes, kaj kompleton de subvestaĵoj en la dorsosako. Sed *tiu* bezonas lavadon. Ĉar ĝi estas tre malpura.

SOLNESS

Ho jes, *tio* eblas. Mi nur informu mian edzinon —

DOKTORO HERDAL

Kaj intertempe mi faros mian viziton al tiu malsanulo.

SOLNESS

Jes, faru. Kaj poste vi ja revenos.

DOKTORO HERDAL

(ŝerce, kun ekrigardo al **Hilde**) Jes, pri tio vi povas ĵuri! (ridas) Vi tamen profetis vere, sinjoro Solness!

SOLNESS

Kiel?

DOKTORO HERDAL

La junuloj *tamen* venis frapante vian pordon.

SOLNESS

(vivigita) Jes, sed tamen alimaniere.

DOKTORO HERDAL

Jes. Sendube!

(Li eliras tra la antaŭĉambra pordo. **Solness** malfermas la pordon dekstre, kaj vokas en la apudan ĉambron.)

SOLNESS

Aline! Bonvolu enveni. Venis iu fraŭlino Wangel, kiun vi konas.

SINJORINO SOLNESS

(aperas ĉe la pordo) Kiu *estas*, vi diras? (ekvidas **Hilde**) Ho, ĉu estas *vi*? (alproksimiĝas kaj etendas manon) Vi do tamen venis al la urbo.

SOLNESS

Fraŭlino Wangel ĵus alvenis. Kaj ŝi petas resti ĉi tie la nokton.

SINJORINO SOLNESS

Ĉe ni? Jes kompreneble.

SOLNESS

Por ordigi siajn vestaĵojn, vidu.

SINJORINO SOLNESS

Mi zorgos pri vi kiel eble bone. Estas ja nur devo. Via valizo do postvenos?

HILDE

Mi ne *havas* valizon.

SINJORINO SOLNESS

Nu, tio ordiĝos, mi esperas. Sed nun vi devas kontentiĝi ĉi tie ĉe mia edzo. Kaj mi prizorgos ĉambron agrablan por vi.

SOLNESS

Ĉu ni ne povas preni unu el la infanĉambretoj? Ĉar ili ja staras tute pretaj.

SINJORINO SOLNESS

Ho jes. *Tie* ni havas pli ol sufiĉe da loko. (al **Hilde**) Eksidu nun kaj iomete ripozu. (Ŝi eliras dekstren)

(**Hilde**, kun la manoj sur la dorso, paŝadas en la ĉambro kaj ekrigardas ion aŭ alian. **Solness** staras antaŭ la tablo, ankaŭ li kun la manoj surdorse, kaj ŝin sekvante per la okuloj.)

HILDE

(haltas kaj rigardas lin) Ĉu vi havas plurajn infanĉambretojn?

SOLNESS

Estas tri infanĉambretoj en la domo.

HILDE

Oho, multe. Vi do havas ege multajn infanojn, ĉu?

SOLNESS

Ne. Ni havas neniun infanon. Sed nun *vi* ja povas esti infano ĉi tie.

HILDE

Ĉi tiun nokton, jes. Mi ne krios. Mi provos dormi kiel ŝtono.

SOLNESS

Jes. Vi certe estas tre laca, mi pensas.

HILDE

Ho ne! Sed tamen —. Ĉar estas terure bonege kuŝi tiel songante.

SOLNESS

Vi ofte songas nokte, ĉu?

HILDE

Ho jes! Preskaŭ ĉiam.

SOLNESS

Pri kio vi *pleje* songas?

HILDE

Tion mi ne diras ĉi-vespere. Alian fojon — eble.

(Ŝi denove paŝadas sur la planko, haltas apud la pupitro kaj foliumas iomete inter la libroj kaj la paperoj.)

SOLNESS

(iras pli proksimen) Ĉu vi ion serĉas?

HILDE

Ne, mi nur staras rigardante tion ĉi. (turnas sin) Eble mi ne rajtas?

SOLNESS

Jes, bonvolu.

HILDE

Ĉu estas *vi*, kiu skribas en tiun grandan protokolon?

SOLNESS

Ne, tion faras la librotenistino.

HILDE

Virino?

SOLNESS

(ridetas) Jes, kompreneble.

HILDE

Tia, kian vi tenas ĉe vi tie ĉi?

SOLNESS

Jes.

HILDE

Ĉu ŝi estas edziniĝinta?

SOLNESS

Ŝi estas fraŭlino.

HILDE

Nu tiel.

SOLNESS

Sed ŝi eble baldaŭ edziniĝos.

HILDE

Estas bone por *ŝi*, tio.

SOLNESS

Sed ne precipe bone por *mi*. Ĉar tiam mi havos neniun por helpi min.

HILDE

Ĉu vi ne povas havigi iun alian, kiu estas same taŭga?

SOLNESS

Eble vi volus resti ĉi tie kaj — kaj skribi en la protokolon?

HILDE

(rigardas lin de supre malsupren) Nu, *tion* vi kredus! Ne dankon, — tio ne okazu.

(Ŝi denove paŝadas trans la plankon kaj eksidas sur la balancseĝon. Ankaŭ **Solness** iras al la tablo.)

HILDE

(kvazaŭ daŭrigante) — ĉar ĉi tie certe estas aliaj eblecoj por okupiĝi ol tiaĵoj. (rigardas lin ridete) Ĉu ne ankaŭ vi *tion* opinias?

SOLNESS

Kompreneble. Unue vi eble volas viziti la butikojn por provizi vin per bezonaĵoj.

HILDE

(ŝerce) Ne, *tion* mi ne intencas!

SOLNESS

Ĉu?

HILDE

Jes, ĉar mi jam plene elspezis mian monon.

SOLNESS

(ridas) Do, nek valizo kaj nek mono!

HILDE

Nenio el ambaŭ. Sed ĉit, — ne gravas nun.

SOLNESS

Jen, pro *tio* mi ŝatas vin!

HILDE

Nur pro *tio*?

SOLNESS

Pro diversaj kialoj. (eksidas sur la apogseĝon) Ĉu via patro ankoraŭ vivas?

HILDE

Jes, patro vivas.

SOLNESS

Kaj nun vi eble intencas studi ĉi tie?

HILDE

Ne, pri tio mi ne ekpensis.

SOLNESS

Sed vi do restos ĉi tie dum ioma tempo, mi pensas?

HILDE

Laŭ la okazaĵoj.

(Ŝi sidas momenton balancante, kaj rigardante lin, duone serioze, duone kun subpremata rideto. Ŝi deprenas sian ĉapelon, kaj metas ĝin antaŭ sin sur la tablon.)

HILDE

Konstruestro Solness?

SOLNESS

Jes?

HILDE

Vi estas tre forgesema, ĉu?

SOLNESS

Forgesema? Ne, ne laŭ *mia* scio.

HILDE

Sed ĉu vi nepre ne volas paroli kun mi pri *tio* tie norde?

SOLNESS

(ekmiras) Norde en Lysanger? (indiferente) Nu, pri tio ne estas multe direnda, mi pensas.

HILDE

(rigardas lin riproĉe) Kial vi nun sidas tie dirante tiaĵon!

SOLNESS

Nu, do *vi* parolu al *mi* pri tio.

HILDE

Kiam la turo estis finkonstruita, estis granda solenaĵo en la urbo.

SOLNESS

Jes, tiun tagon mi ne facile forgesos.

HILDE

(ridetas) Ĉu ne? Estas afable de vi, tio!

SOLNESS

Afable?

HILDE

Estis muziko en la preĝeja placo. Kaj multaj, multaj centoj da homoj. Ni lernantinoj estis blanke vestitaj. Kaj ni ĉiuj portis flagojn.

SOLNESS

Ho jes, la flagojn, — tiujn mi ja efektive memoras!

HILDE

Kaj vi grimpis rapide supren la skafaldon. Tute supren al la plej alta pinto. Kaj grandan florkronon vi kunportis. Kaj tiun florkronon vi pendigis tute supre sur la ventomontrilo.

SOLNESS

(mallonge, interrompante) Tiel mi tiam faris. Ĉar estis malnova kutimo.

HILDE

Estis mirinde incite stari tie sube kaj rigardi supren al vi. Imagu se li falus! Li, — la konstruestro mem!

SOLNESS

(kvazaŭ deturnante) Jes, jes, jes, povus okazi. Ĉar unu el tiuj blanke vestitaj diablidoj, — ŝi *kondutis* tiel freneze kaj kriis supren al mi —

HILDE

(brile ĝoje) “Hura por konstruestro Solness”! Jes!

SOLNESS

— kaj svingadis tiel per la flago, ke mi — ke mi preskaŭ kapturniĝis rigardante.

HILDE

(pli mallaŭte, serioze) Tiu diablido, — tiu estis *mi*.

SOLNESS

(fiksas rigide la okulojn sur ŝin) Pri tio mi nun certas. Devas esti *vi*.

HILDE

(denove vigla) Ĉar estis terure loge kaj incite. Mi ne povis kredi, ke troviĝas en la mondo konstruestro, kiu povus konstrui tian senmezure altan turon. Kaj jen tio, ke vi mem staris tie supre ĉe la plej alta pinto! Tute vivanta! Kaj ke vi tute ne kaptiĝis de vertiĝo! *Tio* estis ja la pli — pli — vertiĝanta imago.

SOLNESS

Kiel vi do tiel certe sciis, ke mi ne vertiĝis —?

HILDE

(repuŝante) Ho ne! Ne! Tion mi sentis interne. Ĉar alie vi ne estus povinta stari tie supre kantanta.

SOLNESS

(rigardas ŝin mire) Kantanta? Ĉu *mi* kantis?

HILDE

Jes, vi efektive faris.

SOLNESS

(agitas la kapon) Mi neniam dum mia vivo kantis strofon.

HILDE

Jes, tiam vi kantis. Sonis kiel harpoj en la aero.

SOLNESS

(penseme) Estas iom stranga, — tio ĉi.

HILDE

(silentas momenton, rigardas lin kaj diras mallaŭte) Sed *jen*, — poste, — *tiam* sekvis la *ĝusta*.

SOLNESS

La *ĝusta*?

HILDE

(brile vigle) Jes, pri *tio* mi ja ne bezonas memoriĝi vin?

SOLNESS

Ho jes, memorigu min iomete ankaŭ pri *tio*.

HILDE

Ĉu vi ne povas memori, ke oni aranĝis grandan bankedon por vi en la klubo?

SOLNESS

Nu jes. Okazis certe la saman posttagmezon. Ĉar la sekvan matenon mi forvojaĝis.

HILDE

Kaj post la klubo vi estis invitata hejmen al ni por la vespermanĝo.

SOLNESS

Tute ĝuste, fraŭlino Wangel. Strange, kiel bone vi memoras ĉi tiujn bagatelaĵojn.

HILDE

Bagatelaĵojn! Ho, vi parolas! Ĉu eble estis bagatelaĵo ankaŭ tio, ke mi estis *sola* en la ĉambro, kiam vi venis?

SOLNESS

Vi do vere *estis*?

HILDE

(ne lin respondante) Tiam vi ne nomis min diablido.

SOLNESS

Ne, tion mi eble ne faris.

HILDE

Vi diris, ke mi estas belega en tiu blanka robo, kaj ke mi aspektas kvazaŭ eta princino.

SOLNESS

Vi certe tiel aspektis, fraŭlino Wangel. Kaj krome — kiom mi sentis min libera kaj vigla tiun tagon —

HILDE

Kaj vi diris, ke kiam mi fariĝos granda, mi estos *via* princino.

SOLNESS

(ridas iomete) Jen, jen, — ĉu ankaŭ *tion* mi diris?

HILDE

Jes, vi faris. Kaj kiam mi demandis kiom longe mi devus atendi, vi diris ke vi revenos

post dek jaroj, — kiel trolo, — por forrabi min. Al Hispanio aŭ ien. Kaj *tie* vi aĉetus reĝlandon por mi, vi promesis.

SOLNESS

(kiel antaŭe) Jes, post bona tagmanĝo oni ne precize nombras la monerojn. Sed ĉu mi vere *diris* ĉion tion?

HILDE

(ridas silente) Jes. Kaj vi ankaŭ diris la nomon de tiu reĝlando.

SOLNESS

Nu?

HILDE

Ĝi nomiĝus Oranĝosinio, vi diris.

SOLNESS

Nu, estas ja apetitodona nomo.

HILDE

Ne, al mi ĝi tute ne plaĉis. Ĉar aspekto vi mokis min.

SOLNESS

Sed *tio* certe ne estis mia intenco.

HILDE

Ne, tion oni ja ne kredus. Laŭ tio, kion vi faris poste —

SOLNESS

Kion mi do poste faris?

HILDE

Jes, mankis nur ke vi ankaŭ *tion* forgesis! Ĉar tiaĵon oni devas ja memori, mi opinias.

SOLNESS

Jes, jes, iomete memorigu min, kaj eble —. Nu?

HILDE

(fiksrigardas lin) Vi kaptis min kaj kisis min, konstruestro Solness.

SOLNESS

(gapante ekstaras de la seĝo) Ĉu faris *mi*!

HILDE

Jes ja, vi faris. Vi prenis min per ambaŭ manoj kaj klinis min malantaŭen kaj kisis min. Multajn fojojn.

SOLNESS

Ho, sed kara, bona fraŭlino Wangel —!

HILDE

(ekstaras) Vi do ne volas tion nei?

SOLNESS

Jes, tion mi vere neas!

HILDE

(rigardas lin malestime) Nu tiel.

(Ŝi turnas sin kaj iras malrapide tute al la forno, kie ŝi restas staranta forturnita kaj senmova kun la manoj surdorse. Mallonga paŭzo.)

SOLNESS

(iras singardeme al ŝi malantaŭe) Fraŭlino Wangel —?

HILDE

(silentas kaj ne movas sin)

SOLNESS

Ne staru tie kiel ŝtonstatuo. Kion vi diris, devas esti io, kion vi songis. (metas la manon sur ŝian brakon) Aŭskultu nun —

HILDE

(faras senpaciencan movon per la brako)

SOLNESS

(kvazaŭ penso eklumas en li) Aŭ —! Atendu! — Kaŝas sin io pli profunda sube, vidu!

HILDE

(ne movas sin)

SOLNESS

(mallaŭte sed intense) Mi eble estis *pensinta* tion ĉi. Mi eble *volis* tion. *Deziris* tion. *Emis* fari tion. Kaj —. Ĉu ne povus esti tiel?

HILDE

(daŭre silentas)

SOLNESS

(senpacience) Nu ja, jes, je diablo, — do mi *faris*!

HILDE

(iomete turnas la kapon, sen lin rigardi) Vi do nun konfesas?

SOLNESS

Jes, ĉion kion vi volas.

HILDE

Ke vi ĉirkaŭbrakis min?

SOLNESS

Jes jes!

HILDE

Kaj klinis min malantaŭen?

SOLNESS

Tre profunde malantaŭen.

HILDE

Kaj kisis min?

SOLNESS

Jes, mi faris.

HILDE

Multajn fojojn?

SOLNESS

Tiom da fojoj kiom vi volas.

HILDE

(rapide turnas sin al li kaj reprenas la brile ĝojan esprimon) Nu vidu, ke mi fine sukcesis tion eltiri el vi!

SOLNESS

(ekridetas) Jes, imagu nur, — ke mi povis forgesi tion.

HILDE

(denove iomete malgajhumora, iras for de li) Ho, vi certe kisis tiom multajn dum via vivo, mi kredas.

SOLNESS

Ne, *tion* vi do ne kredu pri mi.

(**Hilde** eksidas en la apogseĝon. **Solness** staras sin apogante al la balancseĝo.)

SOLNESS

(rigardas ŝin explore) Fraŭlino Wangel?

HILDE

Jes?

SOLNESS

Kiel do *estis*? Kio do okazis poste, — tio inter ni du?

HILDE

Nenio pli okazis. Tion vi ja scias. Ĉar venis ja la aliaj gastoj, kaj — iŝ!

SOLNESS

Jes ĝuste! La aliuloj venis. Ke mi povis ankaŭ *tion* forgesi.

HILDE

Ho, vi ja efektive nenion forgesis. Nur hontis iomete. Tiaĵon oni ne forgesas, mi scias.

SOLNESS

Ne. Aspektus ja tiel.

HILDE

(denove vigla, rigardas lin) Aŭ eble vi ankaŭ forgesis kiun tagon tio okazis?

SOLNESS

Kiun tagon —?

HILDE

Jes, kiun tagon vi metis la florkronon sur la turon? Nu? Diru tuj!

SOLNESS

Hm, — la ĝustan tagon mi vere forgesis. Mi nur scias, ke estis antaŭ dek jaroj. Tiel dum la aŭtuno.

HILDE

(kelkfoje kapjesas malrapide) Estis antaŭ dek jaroj. La 19an de Septembro.

SOLNESS

Nu ja, tiam do eble estis. Jen, ankaŭ *tion* vi memoras, vi! (haltas) Sed aŭdu —! Jes, — hodiaŭ estas ankaŭ la 19a de Septembro.

HILDE

Jes, estas. Kaj la dek jaroj forpasis. Kaj vi ne venis, — kiel vi promesis al mi.

SOLNESS

Promesis? Timigis vin per tio, vi certe pensas?

HILDE

Mi opinias, ke *tio* ne estas io timiga.

SOLNESS

Nu, moketis vin do.

HILDE

Ĉu estis nur *tio*, kion vi volis? Moki min?

SOLNESS

Nu, aŭ nur ŝerci iomete kun vi. Je Dio, mi ne ĝuste memoras. Sed io tia certe estis. Ĉar vi estis ja nur infano tiam.

HILDE

Ho, mi eble ne estis tiel nura infano. Ne tia knabineto, kian *vi* opinias.

SOLNESS

(rigardas ŝin explore) Ĉu vi vere tute serioze pensis, ke mi revenus?

HILDE

(kaŝas duone ŝercan rideton) Jes vere! *Tion* mi atendis de vi.

SOLNESS

Ke mi revenus al vi por preni vin kun mi?

HILDE

Ĝuste kiel trolo, jes.

SOLNESS

Kaj fari vin princino?

HILDE

Tion vi ja promesis.

SOLNESS

Kaj ankaŭ donaci al vi reĝlandon?

HILDE

(rigardas al la plafono) Kial ne? Ĉar ne devus ja nepre esti ia tia ordinara, reala reĝlando.

SOLNESS

Sed iu alia, same bona?

HILDE

Jes, almenaŭ same bona. (rigardas lin iomete) Se vi kapablis konstrui la plej altajn preĝejturojn en la mondo, vi ja certe ankaŭ povus trovi eblecon por iu reĝlando, — mi pensis.

SOLNESS

(skuas la kapon) Mi vere ne kapablas kompreni vin, fraŭlino Wangel.

HILDE

Ĉu ne? Ŝajnas al mi tre simple.

SOLNESS

Ne, mi tute ne komprenas ĉu vi vere imagas, kion vi diras. Aŭ ĉu vi nur sidas tie ŝercante —

HILDE

(ridetas) Eble mokas? Ankaŭ mi?

SOLNESS

Jes ĝuste. Mokas. Nin ambaŭ. (ekrigardas ŝin) Ĉu vi longe scias, ke mi estas edziĝinta?

HILDE

Jes, tion mi estas scianta la tutan tempon. Kial vi demandas pri *tio*?

SOLNESS

(pase) Ne, ne, mi nur ekpensis tiel. (rigardas ŝin serioze kaj diras mallaŭte) Kial vi venis?

HILDE

Ĉar mi volas havi mian reĝlandon. Forpasis la interkonsentita tempo.

SOLNESS

(ridas senvole) Vi estas ŝercemulino!

HILDE

(gaje) Prezentu mian reĝlandon, konstruestro! (frapas per la fingro) La reĝlandon sur la tablon!

SOLNESS

(ŝovas la balancseĝon pli proksimen kaj eksidas) Serioze dirite, — kial vi venis? Kion vi intencas fari ĉi tie?

HILDE

Ho, unue mi volas ĉirkaŭiri kaj rigardi ĉion, kion vi konstruis.

SOLNESS

Do vi havas sufiĉe por ĉirkaŭkuri.

HILDE

Jes, vi ja konstruis ege multe.

SOLNESS

Jes, mi faris. Pleje la lastajn jarojn.

HILDE

Ankaŭ multajn preĝejturojn? Tiajn ege altajn?

SOLNESS

Ne. Nun mi ne plu konstruas preĝejturojn. Kaj ankaŭ ne preĝejojn.

HILDE

Kion vi do *nun* konstruas?

SOLNESS

Hejmojn por homoj.

HILDE

(penseme) Ĉu vi ne povus fari ion, — ion similan al preĝejturoj ankaŭ sur tiuj hejmoj?

SOLNESS

(miras) Kion vi aludas per *tio*?

HILDE

Mi aludas ion, — ion montranta — kvazaŭ libere supren. Kun la ventomontrilo vertiĝe tute alte.

SOLNESS

(pripensas) Strange ke vi *tion* diras. Ĉar estas ja tio, kion mi pleje ŝatus fari.

HILDE

(senpacience) Sed kial vi *tion* ne *faras*?

SOLNESS

(agitas la kapon) Ne, ĉar la homoj ne volas ĝin *havi*!

HILDE

Imagu, — ke ili ne volas!

SOLNESS

(pli facile) Sed nun mi konstruas novan hejmon por mi. Jen, tute proksime.

HILDE

Por vi mem?

SOLNESS

Jes. Ĝi preskaŭ finiĝis. Kaj sur *ĝi* estas turo.

HILDE

Alta turo?

SOLNESS

Jes.

HILDE

Tre alta?

SOLNESS

Homoj certe diros, ke ĝi estas tro alta. Almenaŭ por hejmo.

HILDE

Tiun turon mi volas tuj rigardi morgaŭ matene.

SOLNESS

(sidas la mentonon apogitan sur la mano ŝin rigardante) Diru al mi, fraŭlino Wangel, — kiel vi nomiĝas? Baptonome, mi volas diri.

HILDE

Mi nomiĝas Hilde.

SOLNESS

(kiel antaŭe) Hilde? Ĉu?

HILDE

Ĉu vi *tion* ne memoras? Vi ja mem nomis min Hilde. La tagon kiam vi malbonkonduitis.

SOLNESS

Ĉu ankaŭ *tion* mi faris?

HILDE

Sed tiam vi diris *eta* Hilde. Kaj *tion* mi ne ŝatis.

SOLNESS

Ĉu *tion* vi ne ŝatis, fraŭlino Hilde?

HILDE

Ne. Ne je *tiu* okazo. — Cetere — “princino Hilde” — Tio aspektos tre bone, mi opinias.

SOLNESS

Nu jes. Princino Hilde el — el —. Kiel do tiu reĝlando nomiĝus?

HILDE

Iŝ do! Mi ne volas aŭdi pli pri tiu stulta reĝlando. Mi volas havi iun tute alian, mi!

SOLNESS

(klinas sin malantaŭen en la seĝo, kaj daŭre rigardas ŝin) Ĉu ne estas strange —? Ju pli mi pensas pri tio nun, — estas por mi kvazaŭ mi tutajn longajn jarojn turmentadis min mem por — hm —

HILDE

Por kio?

SOLNESS

Por *memori* ion — ion *travivitan*, kion aspekte mi forgesis. Sed neniam mi kaptis *tion*, kio ĝi estus.

HILDE

Vi devus fari nodon sur vian poŝtukon, konstruestro.

SOLNESS

Tiam mi estus devinta pensadi, kion tiu nodo signifus.

HILDE

Nu ja, troviĝas ankaŭ *tiaj* troloj en la mondo.

SOLNESS

(ekstaras malrapide) Bonege ke vi venis al mi nun.

HILDE

(rigardas lin profunde) Ĉu *estis* bone?

SOLNESS

Ĉar mi sidis ĉi tie tute sola. Kaj fiksrigardis senhelpe al ĉio. (pli malrapide) Mi diru al vi, — mi komenciĝis fariĝi timema, — ege timema pro la junuloj.

HILDE

(blovas) Pa, — la junuloj, ĉu ili estas timigaj!

SOLNESS

Jes, ĝuste ili. Tial mi ŝlosis kaj enfermis min. (mistere) Sciu, ke la junuloj venos frapegante mian pordon! Enrompi enen al mi!

HILDE

Mi do pensas, ke vi devas eliri kaj malfermi por la junuloj.

SOLNESS

Malfermi?

HILDE

Jes. Por ke la junuloj envenu al vi. Tiel libere.

SOLNESS

Ne, ne, ne! La junuloj, vidu — ili estas la venĝo. Ili venas fronte de la nova tempo. Kvazaŭ sub nova standardo.

HILDE

(ekstaras, rigardas lin kaj diras kun trema tiko ĉe la buŝo) Ĉu vi povas uzi *min* por io, konstruestro?

SOLNESS

Jes, mi ja povas nun! Ĉar ŝajnas al mi ke ankaŭ *vi* venas — kvazaŭ sub nova standardo. Junulo kontraŭ junuloj do —!

(**Doktoro Herdal** envenas tra la antaŭĉambra pordo)

DOKTORO HERDAL

Nu, — ĉu vi daŭre sidas ĉi tie, vi kaj la fraŭlino?

SOLNESS

Jes. Ni havis multe priparolindan, ni du.

HILDE

Kaj novaĵojn kaj malnovaĵojn.

DOKTORO HERDAL

Ĉu vere?

HILDE

Ho, estis ege amuze. Ĉar konstruestro Solness — li havas tian bonegan memorkapablon, li. Ĉiujn ajn bagatelojn li tuj memoras.

(**Sinjorino Solness** venas tra la pordo dekstre.)

SINJORINO SOLNESS

Nun, fraŭlino Wangel, la ĉambro estas preta por vi.

HILDE

Ho, kiel afabla vi estas al mi!

SOLNESS

(al la **sinjorino**) La infanĉambro?

SINJORINO SOLNESS

Jes. La meza. Sed unue ni devus iri al la tablo, ĉu ne?

SOLNESS

(kapsignas al **Hilde**) Hilde dormu en la infanĉambro, ŝi.

SINJORINO SOLNESS

(rigardas lin) Hilde?

SOLNESS

Jes, fraŭlino Wangel nomiĝas Hilde. Mi konis ŝin, kiam ŝi estis infano.

SINJORINO SOLNESS

Ho, ĉu vi *faris*? Nu do, bonvolu. La tablo estas preta.

(Ŝi prenas la brakon de **doktoro Herdal** kaj iras dekstren)

(Dume **Hilde** kolektas siajn pakaĵojn)

HILDE

(mallaŭte kaj rapide al Solness) Ĉu estas vero, kion vi diris? Ĉu vi *povas* uzi *min* por io?

SOLNESS

(prenas ŝiajn aĵojn) *Vi* estas tiu, kiun mi plej kore sopiris.

HILDE

(rigardas lin per ĝoje mirantaj okuloj, kaj kunfrapas la manojn) Ho vi granda, ĝuinda mondo —!

SOLNESS

(ekscitite) Nu —?

HILDE

Tiel mi ja *havas* mian reĝlandon!

SOLNESS

(senvole) Hilde —!

HILDE

(denove kun la tremanta tiko ĉe la buŝo) *Preskaŭ*, — mi dirus.

(Ŝi eliras dekstren. **Solness** sekvas ŝin.)

DUA AKTO

(Bele meblita, pli malgranda salono ĉe **konstruisto Solness**. Sur la fona muro vitra pordo elen al verando kaj ĝardeno. Dekstre angulo kun orielo, en kiu estas floroj kaj granda fenestro. Koresponda angulo maldekstre. En tiu estas malgranda panelpordo. Sur ambaŭ flankaj muroj ordinaraj pordoj. Antaŭe dekstre konzoltablo kun granda spegulo. Floroj kaj plantoj riĉe aranĝitaj. Antaŭe maldekstre

sofo kun tablo kaj seĝoj. Pli malantaŭe libroŝranko. Sur la planko, antaŭ la orielo, tableto kaj kelkaj seĝoj. Estas frue antaŭtagmeze.)

(**Konstruero Solness** sidas ĉe la tableto kun la dokumentujo de **Ragnar** malfermita antaŭ si. Li foliumas inter la desegnaĵoj kaj detale rigardas kelkajn el ili. **Sinjorino Solness** paŝadas senbrue kun malgranda akvujo ordigante la florojn. Ŝi estas nigre vestita kiel antaŭe. Ŝiaj ĉapelo, supervestoj kaj sunŝirmilo kuŝas sur seĝo apud la spegulo. **Solness** foje nerimarkite sekvas ŝin per la okuloj. Neniu el ili parolas.)

(**Kaja Fosli** silente venas tra la pordo maldekstre.)

SOLNESS

(turnas la kapon kaj diras indifere pase) Nu, ĉu estas *vi*?

KAJA

Mi volis nur informi, ke mi venis.

SOLNESS

Jes, jes, bone. Kaj Ragnar, ĉu ankaŭ li?

KAJA

Ne, ankoraŭ ne. Li devis resti por atendi la doktoron. Sed poste li volus veni por scii

—

SOLNESS

Kiel statas pri la maljunulo hodiaŭ?

KAJA

Malbone. Li petas pardonon, ke li devas kuŝi la tutan tagon.

SOLNESS

Nu ja. Ke li faru. Sed vi do iru al via laboro.

KAJA

Jes. (haltas ĉe la pordo) Eble vi volas paroli kun Ragnar, kiam li venos?

SOLNESS

Ne, — mi ne scias pri io preciza.

(**Kaja** eliras maldekstre)

(**Solness** daŭre sidas foliumante la desegnaĵojn.)

SINJORINO SOLNESS

(ĉe la plantoj) Mi scius, ĉu ne ankaŭ li mortos.

SOLNESS

(ekrigardas ŝin) Ankaŭ li? Kiu krom li?

SINJORINO SOLNESS

(ne respondante) Jes, jes; maljuna Brovik — li eble mortos nun ankaŭ li, Halvard. Vi vidos.

SOLNESS

Kara Aline, ĉu vi ne devus eliri por iomete promeni?

SINJORINO SOLNESS

Jes, mi ja devus fari. (Ŝi daŭrigas ordigi la florojn.)

SOLNESS

(laŭte, super la desegnaĵoj) Ĉu ŝi daŭre dormas?

SINJORINO SOLNESS

(rigardas lin) Ĉu estas fraŭlino Wangel pri kiu vi pensadas?

SOLNESS

(indiferente) Tiel hazarde mi ekmemoris pri ŝi.

SINJORINO SOLNESS

Fraŭlino Wangel ellitiĝis antaŭ longe.

SOLNESS

Nu, ŝi *faris*?

SINJORINO SOLNESS

Kiam mi enrigardis, ŝi sidis pretigante siajn vestaĵojn. (Ŝi iras antaŭ la spegulon, kaj komencas malrapide surmeti la ĉapelon.)

SOLNESS

(post mallonga paŭzo) Fine ni tamen trovis uzon por infanĉambreto, Aline.

SINJORINO SOLNESS

Jes, efektive.

SOLNESS

Kaj ŝajnas al mi pli bone, ol ke ĉio restas malplena.

SINJORINO SOLNESS

Tiu malpleno estas vere terura. Vi pravas.

SOLNESS

(fermas la dokumentujon, ekstaras kaj proksimas) Vi *tion* vidos, Aline, ke de nun fariĝos pli bone por ni. Multe pli hejmece. Pli facile vivi. — Precipe por vi.

SINJORINO SOLNESS

(ekrigardas lin) De nun?

SOLNESS

Jes, kredu min, Aline —

SINJORINO SOLNESS

Ĉu vi aludas, — ĉar *ŝi* venis al ni?

SOLNESS

(regas sin) Mi kompreneble celas, — kiam ni transloĝiĝos en la novan domon.

SINJORINO SOLNESS

(prenas la supervestaĵojn) Jes, ĉu vi tion kredas, Halvard? Ke tiam fariĝos pli bone?

SOLNESS

Ion alian mi tute ne povas imagi. Kaj certe ankaŭ vi tion kredas?

SINJORINO SOLNESS

Mi tute nenion kredas pri la nova domo.

SOLNESS

(malbonhumore) Estas vere seniluziige por mi aŭdi tion. Ĉar estas ja precipe por vi, ke mi konstruis ĝin. (Li volas helpi ŝin pri la vestaĵoj.)

SINJORINO SOLNESS

(evitante) Funde vi faras tro multe por mi.

SOLNESS

(iom ekscitite) Ne, ne, tiaĵon vi ne devas diri, Aline! Mi ne toleras aŭdi tiaĵon de vi!

SINJORINO SOLNESS

Nu, do mi tion ne plu diros, Halvard.

SOLNESS

Sed mi havas opinionon *mian*. Vi tamen vidos, ke aranĝigos bone por vi en la nova domo.

SINJORINO SOLNESS

Ho Dio, — bone por mi —!

SOLNESS

(vigle) Jes! Jes! Fidu nur *tion*! Ĉar *tie*, vidu, — *tie* estos nekredeble multe kio memorigos vin pri via propra —

SINJORINO SOLNESS

Pri tio, kio estis post patro kaj patrino, — Kaj forbrulis — ĉio.

SOLNESS

(mallaŭte) Jes, jes, vi kompatinda Aline. Estis terura bato por vi, tiu.

SINJORINO SOLNESS

(ekplendas) Vi povas konstrui kiom ajn, kion vi volas, Halvard, — por *mi* vi ne plu povas rekonstrui veran hejmon!

SOLNESS

(paŝadas sur la planko) Nu, do ni je Dio ne plu parolu pri tio ĉi.

SINJORINO SOLNESS

Alie ni ja ne kutimas paroli pri tio. Ĉar vi ja ĉiam evitas la temon —

SOLNESS

(abrupte haltas kaj rigardas ŝin) Ĉu *mi*? Kial mi *tion* farus? Evitas?

SINJORINO SOLNESS

Ho jes, mi bone komprenas vin, Halvard. Vi volas kompati min. Kaj ankaŭ senkulpigi min. Tiom, — kiom vi povas.

SOLNESS

(kun surprizitaj okuloj) *Vin*! Ĉu estas *vi*, — vi mem, pri kiu vi parolas, Aline!

SINJORINO SOLNESS

Jes, devas ja esti pri mi, ĉu ne?

SOLNESS

(nevole al si mem) Ankaŭ *tio*!

SINJORINO SOLNESS

Ĉar pri la malnova domo, — pri ĝi devis esti kiel estis. Granda Dio, — kiam unue la akcidento okazis, —

SOLNESS

Jes, vi pravas. Akcidenton oni ne regas, — oni diras.

SINJORINO SOLNESS

Sed la teruraĵo kiu postsekvis la fajron —! Estas *tio*! Tio, tio, tio!

SOLNESS

(impete) Pri ĝi ne pensu, Aline!

SINJORINO SOLNESS

Jes, ĝuste pri *tio* mi devas pensi. Kaj fine ankaŭ povi paroli pri ĝi. Ĉar ŝajnas al mi, ke mi ne plu povas porti tion. Kaj ke mi neniam permesiĝas pardoni min mem —!

SOLNESS

(ekkrie) Vin mem —

SINJORINO SOLNESS

Jes, ĉar mi ja havis devojn al du flankoj. Al vi kaj al la etuloj. Mi estus devinta hardi min. Ne estus devinta lasi la timon ŝteli miajn fortojn. Eĉ ne la aflikton, ĉar la hejmo forbrulis por mi. (tordas la manojn) Ho, se mi estus povinta, Halvard!

SOLNESS

(mallaŭte, skuita, proksimiĝas) Aline, — promesu al mi, ke vi neniam plu pensu tiajn pensojn. — Promesu al mi tion!

SINJORINO SOLNESS

Ho Dio, — promesi! Promesi! Eblas ja promesi kion ajn —

SOLNESS

(premas la manojn kaj paŝadas sur la planko) Ho, estas malesperige! Neniam radio de suno! Eĉ ne brileto enen en la hejmon!

SINJORINO SOLNESS

Ĉi tie ja ne estas hejmo, Halvard.

SOLNESS

Ho ne! Vere, vere. (peze) Kaj Dio scias ĉu vi ne pravos en *tio*, ke ne fariĝos pli bone por ni en la nova domo.

SINJORINO SOLNESS

Fariĝos neniam. Same malplene. Same senhome. *Jene* kiel *ĉi tie*.

SOLNESS

(impete) Sed, je la mondo, kial ni do konstruis ĝin? Diru al mi!

SINJORINO SOLNESS

Ne, al tio vi devas mem respondi.

SOLNESS

(ekrigardas ŝin suspekteme) Kion vi aludas per *tio*, Aline?

SINJORINO SOLNESS

Kion mi aludas?

SOLNESS

Jes, je diablo —! Vi eldiris tiel strange. Kvazaŭ vi havus iun subpenson.

SINJORINO SOLNESS

Ne, pri tio mi povas certigi vin —

SOLNESS

(proksimiĝas) Ho, multan dankon, — mi scias, kion mi scias. Kaj mi ankaŭ vidas kaj aŭdas, mi, Aline. Fidu tion!

SINJORINO SOLNESS

Sed kio do? Kio?

SOLNESS

(starigas sin antaŭ ŝin) Ĉu ne estas tiel, ke vi trovas ruzeman, kaŝitan sencon en la plej sincera vorto, kiun mi diras?

SINJORINO SOLNESS

Mi, vi diras! Ĉu *mi* faras!

SOLNESS

(ridas) Ho, ho, ho! Tio estas ja komprenebla, Aline! havante malsanan edzon en la domo por kiu peni —

SINJORINO SOLNESS

(timigite) *Malsana*? Ĉu vi estas *malsana*, Halvard, —

SOLNESS

(ekkrias) Duone frenezan edzon, do! Frenezan edzon! Nomu min kiel al vi plaĉas.

SINJORINO SOLNESS

(palpas por la seĝdorso kaj eksidas) Halvard, — je Dio en la ĉielo —!

SOLNESS

Sed vi eraras, ambaŭ. Kaj vi kaj la doktoro. Ne estas tiel pri mi.

(Li iras tien kaj reen sur la planko. **SinJORINO Solness** timeme sekvas lin per la okuloj. Poste li iras al ŝi.)

SOLNESS

(trankvile) Funde mankas al mi nenio.

SINJORINO SOLNESS

Ne, ĉu ne! Sed kio do estas pri vi?

SOLNESS

Estas *tio*, ke multfoje mi preskaŭ sentas min ekfali sub tiu terura ŝuldoŝargô —

SINJORINO SOLNESS

Ŝuldo, vi diras! Sed vi ja ne havas ŝuldon al iu, Halvard!

SOLNESS

(mallaŭte, en emocio) Senfundan kulpon, kaj ŝuldon al vi, — al vi, — al vi, Aline.

SINJORINO SOLNESS

(ekstaras malrapide) Kiu estas la subpenso en tio ĉi? Diru prefere tuj.

SOLNESS

Sed ne *estas* iu subpenso! Mi neniam faris al vi malbonon. Almenaŭ ne konscie kaj intence. Kaj tamen — sentiĝas kiel premeganta kulpo kuŝanta sur mi.

SINJORINO SOLNESS

Kulpo al *mi*?

SOLNESS

Pleje al vi.

SINJORINO SOLNESS

Do vi — tamen estas malsana, Halvard.

SOLNESS

(peze) Do eble estas. Aŭ io tia. (rigardas al la pordo dekstre, kiu malfermiĝas) Nu! Nun lumiĝas.

(**Hilde Wangel** envenas. Ŝi iomete ŝanĝis ion sur sia vestaĵo. La juprando estas mallevita.)

HILDE

Bonan matenon, konstruestro!

SOLNESS

(kapsignas) Vi dormis bone?

HILDE

Mirinde bone! Kvazaŭ en lulilo. Ho, — mi kuŝis kaj streĉis min — kvazaŭ princino!

SOLNESS

(ridetas iomete) Efektive ĝuinde.

HILDE

Efektive.

SOLNESS

Kaj eble ankaŭ sonĝis?

HILDE

Jes, jes. Sed *tio* estis terura.

SOLNESS

Ĉu?

HILDE

Jes, ĉar mi sonĝis, ke mi falas de terure alta, kruta rokaĵo. Ĉu vi neniam sonĝas ion tian?

SOLNESS

Nu jes, — foje —

HILDE

Estas tre ekscite — kiam oni falas kaj falas.

SOLNESS

Sentiĝas glaciige, ŝajnas al mi.

HILDE

Ĉu vi tiras la gambojn supren sub vin dum tio okazas?

SOLNESS

Jes, tiel alte kiel eblas.

HILDE

Ankaŭ *mi* faras.

SINJORINO SOLNESS

(prenas la sunŝirmilon) Nun mi devas eliri en la urbon, mi, Halvard. (al **Hilde**) Kaj mi provos trovi ion por vi utilan.

HILDE

(volas ĵeti sin al ŝia kolo) Ho plej kara, plej ĉarma sinjorino Solness! Vi estas vere tro afabla! Ege, ege afabla —

SINJORINO SOLNESS

(deturnante, liberigas sin) Ho, tute ne. Estas ja nur mia devo, tio. Kaj tial mi volonte faras.

HILDE

(ĉagrenita, pintigas la buŝon) Cetere ŝajnas al mi, ke mi povas iri en la stratoj, — tiel bele kiel mi *nun* ordigis la vestaĵojn. Aŭ ĉu mi eble ne *povas*?

SINJORINO SOLNESS

Sincere dirite mi opinias, ke iuj postrigardus vin.

HILDE

(blovas) Puh! Nenio alia? Tio estas ja nur amuza.

SOLNESS

(en kaŝita, malbona humoro) Jes, sed homoj povus imagi al si, ke *ankaŭ* vi estas freneza, vi komprenu.

HILDE

Freneza? Ĉu do estas tiom da frenezuloj en ĉi tiu urbo?

SOLNESS

(montras al sia frunto) Jen vi vidas almenaŭ unu tian.

HILDE

Vi, — konstruestro?

SINJORINO SOLNESS

Uŝ! Ho ne do, kara, bona Halvard!

SOLNESS

Ĉu vi ankoraŭ ne rimarkis tion?

HILDE

Ne, vere ne. (regas sin kaj iomete ridas) Jes, tamen eble en unu sola rilato.

SOLNESS

Nu, ĉu vi *tion* aŭdas, Aline?

SINJORINO SOLNESS

Kiu rilato estas tiu, fraŭlino Wangel?

HILDE

Ne, tion mi ne diras.

SOLNESS

Ho jes, diru!

HILDE

Ho ne, dankon, — *tiel* freneza mi ne estas.

SINJORINO SOLNESS

Kiam vi kaj fraŭlino Wangel estos solaj, ŝi certe diros, Halvard.

SOLNESS

Nu, — Ĉu vi *tion* kredas?

SINJORINO SOLNESS

Ho jes ja. Ĉar vi ja konas ŝin bone de antaŭe. Ĵus ekde ŝi estis infano, — vi ja rakontas.

(Ŝi eliras tra la pordo maldekstre.)

HILDE

(iom poste) Via edzino tute ne ŝatas *min*, ĉu?

SOLNESS

Ĉu vi povis rimarki ion tian pri ŝi?

HILDE

Ĉu vi mem *tion* ne rimarkis?

SOLNESS

(eviteme) Aline fariĝis tre homoevitema la lastajn jarojn.

HILDE

Ĉu ankaŭ *tia*?

SOLNESS

Sed se vi nur pli bone koniĝis al ŝi —. Jes, ĉar funde ŝi estas tre ĝentila — kaj afabla — kaj bona —

HILDE

(senpacienca) Sed se ŝi *tia* estas, — kial ŝi dirus tion ĉi pri devo!

SOLNESS

Pri devo?

HILDE

Jes, ŝi ja diris, ke ŝi volis eliri por aĉeti ion por mi. Ĉar estas ŝia *devo*, — ŝi diris. Ho, mi ne povas elteni tiun malbelan vorton!

SOLNESS

Kial ne?

HILDE

Ne, ĉar ĝi aspektas malvarme kaj pinte kaj pike. Devo — devo — devo. Ĉu ne ankaŭ vi trovas — ke ĝi kvazaŭ pikas?

SOLNESS

Hm, — mi neniam pensis profunde pri tio.

HILDE

Ho jes! Kaj se ŝi estas tiel afabla, — kiel vi diras, ke ŝi estas, — kial ŝi do dirus tiaĵon?

SOLNESS

Sed je Dio, kion ŝi estus dirinta?

HILDE

Ŝi povus diri, ke ŝi volis fari tion, ĉar ŝi tiom multe ŝatas min. Ion tian ŝi estus povinta diri. Ion kio estas vere varma kaj kora, vi komprenu.

SOLNESS

(rigardas ŝin) Ĉu estas *tiel*, ke vi tion preferas?

HILDE

Jes, ĝuste *tiel*. (paŝadas sur la planko, haltas apud la libroŝranko kaj rigardas la librojn)

HILDE

Vi havas tre multajn librojn.

SOLNESS

Ho, mi ja akiris kelkajn.

HILDE

Ĉu vi ankaŭ legas ĉiujn tiujn librojn?

SOLNESS

Pli frue mi provis. Ĉu *vi* legas?

HILDE

Ho ne! Neniam — nun ne plu. Ĉar mi ne sukcesas trovi la kuntekston.

SOLNESS

Ĝuste *tiel* estas ankaŭ pri mi.

(**Hilde** iom paŝadas, haltas ĉe la tableto, malfermas la aktujon kaj foliumas)

HILDE

Ĉu estas vi, kiu desegnis tion ĉi?

SOLNESS

Ne, estas juna viro, kiun mi dungis por helpi min.

HILDE

Unu, kiun vi mem instruis?

SOLNESS

Nu ja, li lernis iom ankaŭ de *mi*.

HILDE

(eksidas) Do li certe estas tre lerta? (rigardas iomete desegnaĵon) Ĉu ne?

SOLNESS

Ne malbona. Por *mia* bezono —

HILDE

Ho jes! Li certe estas ege lerta.

SOLNESS

Ĉu vi vidas tion el la desegnaĵoj?

HILDE

Pa, — tiuj krifaĉoj! Sed ĉar li lernis de *vi*, tiam —

SOLNESS

Ho, pro *tio* —. Estas multaj ĉi tie, kiuj lernis de *mi*. Kaj *same* mallertaj ili estas.

HILDE

(rigardas lin kaj skuas la kapon) Ne, eĉ se mi mortus, mi ne komprenus, ke vi povas esti tiom stulta.

SOLNESS

Stulta? Ĉu vi trovas min tiom stulta?

HILDE

Jes, mi faras. Ĉar vi akceptas instruadi tiajn ulojn, kaj —

SOLNESS

(ekmiras) Nu? Kaj kial ne?

HILDE

(ekstaras, duone serioza, duone ridanta) Iŝŝ, ne do, konstruestro! Al kio *tio* celus! Neniu alia ol *vi* rajtus konstrui. Vi estus la sola pri tio. Fari ĉion mem. Nun vi scias.

SOLNESS

(senpere) Hilde —!

HILDE

Nu?

SOLNESS

Kiel vi venis al tia ideo?

HILDE

Ĉu vi trovas *tion ĉi* malĝuste pensita de mi?

SOLNESS

Ne, *tial* ja ne. Sed nun mi diru ion al vi.

HILDE

Nu kion?

SOLNESS

Senĉese — en silento kaj soleco — mi pensadas pri la sama ideo.

HILDE

Jes, estas ja kompreneble, ŝajnas al mi.

SOLNESS

(rigardas ŝin explore) Kaj tion vi certe jam rimarkis.

HILDE

Ne, tute ne.

SOLNESS

Sed antaŭe, — kiam vi diris, ke vi opiniis min — senseca? Tiel en unu rilato —?

HILDE

Ho, tiam mi pensis pri io tute alia.

SOLNESS

Pri kio alia?

HILDE

Povas esti indiferece por vi, konstruestro.

SOLNESS

(paŝadas sur la planko) Jes, jes, — kiel vi volas. (haltas apud la orielo) Venu ĉi tien, kaj mi montru ion al vi.

HILDE

(proksimiĝas) Kio estas?

SOLNESS

Jen vidu, — tie en la ĝardeno —?

HILDE
Jes?

SOLNESS
(montras eksteren) Ĝuste trans tiu ŝtonejo —?

HILDE
La nova domo vi aludas?

SOLNESS
Tiu kiu estas konstruata, jes. Preskaŭ finita.

HILDE
Ĝi havas tre altan turon, ŝajnas al mi.

SOLNESS
La skafaldo ankoraŭ staras.

HILDE
Ĉu tiu estas via nova domo?

SOLNESS
Jes.

HILDE
(rigardas lin) Ĉu estas infanĉambretoj ankaŭ en *tiu* domo?

SOLNESS
Tri, kiel ĉi tie.

HILDE
Kaj neniuj infanoj.

SOLNESS
Eĉ ne venos.

HILDE
(kun duona rido) Jes, ĉu ne estas kiel mi diris —!

SOLNESS
Ke —?

HILDE

Ke vi tamen estas — iomete — tiel freneza.

SOLNESS

Ĉu estis pri tio ĉi, ke vi pensis?

HILDE

Jes, pri tiuj malplenaj infanĉambretoj, en kiuj mi dormis.

SOLNESS

(mallaŭtigas la voĉon) Ni *havis* infanojn, — Aline kaj mi.

HILDE

(rigardas lin intense) Ĉu *vi* —!

SOLNESS

Du knabetoj. Ambaŭ same aĝaj.

HILDE

Dunaskitoj do.

SOLNESS

Jes, dunaskitoj. Estis antaŭ dek unu — dek du jaroj.

HILDE

(atenteme) Kaj ambaŭ do estas —? Do tiujn dunaskitojn vi ne plu *havas*?

SOLNESS

(en silenta emocio) Ni *havis* ilin nur proksimume du semajnojn. Aŭ apenaŭ *tiom* longe. (impete ekdiras) Ho, Hilde, kiel nekompreneble bone estas por mi, ke vi venis! Ĉar nun fine mi *havas* iun, kun kiu mi povas paroli!

HILDE

Ĉu *tion* vi ne povas — eĉ ne kun *ŝi*?

SOLNESS

Ne pri tio ĉi. Ne kiel mi *volas* kaj devas. (peze) Kaj ankaŭ ne pri multaj aliaj aferoj.

HILDE

(mallaŭte) Ĉu nur *tion* vi celis, kiam vi diris, ke vi bezonas min?

SOLNESS

Nu ja, pli ĝuste. Almenaŭ hieraŭ. Ĉar hodiaŭ mi vere ne plu scias

— (interrompante) Venu, kaj ni eksidu, Hilde. Eksidu en la sofon, — kaj vi havos la ĝardenon antaŭ la okuloj.

(Hilde eksidas en la sofoangulon)

SOLNESS

(tiras seĝon pli proksimen) Ĉu vi ŝatus aŭdi pri ĝi?

HILDE

Jes, mi tre ŝatus aŭskulti vin.

SOLNESS

(eksidas) Kaj mi ĉion diros al vi.

HILDE

Nun mi havas kaj la ĝardenon kaj vin antaŭ la okuloj, konstruestro. Rakontu do! Tuj!

SOLNESS

(montras al la fenestro de la orielo) Jen sur la altejo, — kie vi nun vidas la novan domon —

HILDE

Jes?

SOLNESS

— jen loĝis Aline kaj mi dum la unuaj jaroj. Ĉar tie supre situis tiam malnova domo, kiu antaŭe apartenis al ŝia patrino. Kaj ĝin ni heredis post ŝi. Kaj ankaŭ la tutan grandan ĝardenon.

HILDE

Ĉu estis turo ankaŭ sur *tiu* domo?

SOLNESS

Eĉ ne spuro de tiaĵo. Estis granda, malbela, sombra ligna kesto laŭ ekstera aspekto. Sed tamen sufiĉe varma kaj hejmeca interne.

HILDE

Vi do malkonstruis la malnovan rubaĵon?

SOLNESS

Ne. Ĝi forbrulis por ni.

HILDE

Ĉio?

SOLNESS

Jes.

HILDE

Ĉu estis granda malfeliĉo por vi, tio?

SOLNESS

Dependas. Kiel konstruestro mi prosperis post tiu fajro —

HILDE

Nu, sed —?

SOLNESS

Ni tiam estis ĵus ricevintaj la du knabetojn —

HILDE

La kompatindajn dunaskitojn, jes.

SOLNESS

Ili venis en la mondon sanaj kaj viglaj. Kaj ili kreskis de tago al tago, videble.

HILDE

Infanetoj kreskas rapide la unuajn tagojn.

SOLNESS

Estis la plej bela vidaĵo por la okulo, kiam Aline kuŝis tie kun ambaŭ etuloj. — Sed jen venis la nokto de la fajro —

HILDE

(intense) Kio okazis! Diru do! Ĉu iu mortbrulis!

SOLNESS

Ne; ne tiel. Ĉiuj bone saviĝis el la domo —

HILDE

Nu, sed kio do —?

SOLNESS

La timo skuis Aline tiel terure. La fajroalarmo, — la fuĝo el la domo — tiel urĝa, — kaj eĉ en glaciiga nokta frosto —. Ĉar ni devis ja elporti ilin tiaj kiaj ili estis. Kaj ŝin kaj la etulojn.

HILDE

Tion ili do ne eltenis?

SOLNESS

Jes, *ili* eltenis, sed Aline ekhavis febron. Kaj *tiu* influis la lakton. Mamnutri ilin mem ŝi nepre volis. Ĉar estas ŝia devo, ŝi diris. Kaj ambaŭ niaj knabetoj, ili (kunpremas la manojn) ili — ho!

HILDE

Tion ili ne transvivis?

SOLNESS

Ne, *tion* ili ne transvivis. Estis *tio*, kio forprenis ilin de ni.

HILDE

Certe estis terure por vi.

SOLNESS

Terure por mi. Sed dek fojojn pli terure por Aline. (li pugnigas la manojn en silenta kolero) Ho, ke tiaĵo rajtu okazi en la mondo! (abrupte kaj firme) Ekde la tago kiam mi perdis ilin, mi nevolonte konstruis preĝejojn.

HILDE

Eble eĉ ne la preĝejturon norde ĉe ni?

SOLNESS

Ne volonte. Mi scias kiel ĝoja kaj facila mi sentis min, kiam tiu turo staris finita.

HILDE

Tion ankaŭ *mi* scias.

SOLNESS

Kaj nun mi neniam konstruas — neniam plu tiaĵojn! Nek preĝejojn nek preĝejturojn.

HILDE

(kapsignas malrapide) Nur domojn en kiuj homoj povas loĝi.

SOLNESS

Hejmojn por homoj, Hilde.

HILDE

Sed hejmoj kun altaj turoj kaj turpintoj.

SOLNESS

Jes, prefere tion. (ŝanĝas al pli facila tono) Jes, vidu, — kiel mi diris, — tiu fajro, ĝi portis min supren, ĝi. Ja, kiel konstruestro do.

HILDE

Kial vi ne nomas vin arkitekto, kiel la aliaj?

SOLNESS

Mi ne studis sufiĉe profunde por tio. Kion mi scias, mi ĉefe elpensis mem.

HILDE

Sed supren vi tamen atingis, konstruestro.

SOLNESS

Post la fajro, jes. Preskaŭ la tutan ĝardenon mi parceligis en grundojn por vilaoj. Kaj *tie* mi povis konstrui, ĝuste kiel mi mem deziris. Kaj *sekve* iris por mi glate.

HILDE

(rigardas lin explore) Vi certe estas tre feliĉa viro. Laŭ via nuna stato.

SOLNESS

(sombre) Feliĉa? Ĉu ankaŭ *vi* tion diras? Kiel ĉiuj aliaj.

HILDE

Jes, ĉar tiel ŝajnas al mi. Kiam vi nur ne plu pensas pri la du infanetoj, vi —

SOLNESS

(malrapide) La du infanetoj, — ne estas facile forgesi ilin, Hilde.

HILDE

(iom necerta) Ĉu ili ankoraŭ staras en la vojo? Tiel longe poste?

SOLNESS

(rigardas ŝin firme, sen respondi) Feliĉa viro, vi diris —

HILDE

Jes, sed ĉu vi ne estas, — tamen?

SOLNESS

(daŭre rigardas ŝin) Kiam mi rakontis al vi tion pri la fajro — hm —

HILDE

Nu ja!

SOLNESS

Ĉu ne estis iu certa penso, kiun vi — rimarkis?

HILDE

(pripensas vane) Ne. Kiu penso *tiu* estus?

SOLNESS

(kun subpremata intenseco) Sole pro tiu fajro mi fariĝis kapabla konstrui hejmojn por homoj. Hejmecajn, varmajn, helajn hejmojn, kie patro kaj patrino kaj la tuta infanaro povas vivi en la fidema, ĝoja sento, ke estas ege feliĉa afero tio, *ekzisti* en la mondo. Kaj precipe tio, aparteni unu al la alia — tiel en grandaj kaj malgrandaj rilatoj.

HILDE

(vigle) Jes, sed ĉu ne estas ege granda feliĉo por vi, tio, ke vi povas fari tiajn belegajn hejmojn?

SOLNESS

La prezo, Hilde. La terura prezo kiun mi devis pagi por *atingi*.

HILDE

Sed ĉu trans *tio* do tute neebblas pasi?

SOLNESS

Ne. Por kapabli konstrui hejmojn por aliuloj, mi devis rezigni, — por ĉiam rezigni pri hejmo por mi mem. Mi aludas al hejmo por la infanaro. Kaj ankaŭ por patro kaj patrino.

HILDE

(zorgeme) Sed ĉu vi *tion* do *devis*? Por ĉiam, vi diras?

SOLNESS

(kapjesas malrapide) Estis la prezo por tiu feliĉo, pri kiu homoj babiladas. (elspiras peze) Tiu feliĉo, — hm, — tiu feliĉo ne estis pli malmultekoste havebla, Hilde.

HILDE

(kiel antaŭe) Sed ĉu ne eblas, ke *tio* pliboniĝos?

SOLNESS

Neniam. Neniam. Ankaŭ *tio* estas sekvo de la fajro. Kaj de la posta malsano de Aline.

HILDE

(rigardas lin kun nedifinebla esprimo) Kaj tamen vi daŭre konstruas tiujn infanĉambretojn.

SOLNESS

(serioze) Ĉu vi neniam rimarkis, Hilde, ke la neebleco — ĝi kvazaŭ allogas kaj vokas vin?

HILDE

(pripensas) La neebleco? (vigle) Jes certe! Ĉu ankaŭ *vi* tiel sentas?

SOLNESS

Jes, mi tiel sentas.

HILDE

Do estas — iomete trolo ankaŭ en *vi*?

SOLNESS

Kial trolo?

HILDE

Kiel *vi* do volas nomi tiaĵon?

SOLNESS

(ekstaras) Ne, ne, eble estas. (impete) Sed ĉu mi ne devas *fariĝi* trolo, — pro tio kiel ĉiam okazas por mi en ĉio! En ĉio!

HILDE

Kiel?

SOLNESS

(mallaŭte, en interna emocio) Rimarku kion mi diras al vi, Hilde. Ĉio kion mi sukcesis fari, konstrui, krei en beleco, en sekureco, en hejmeco, — ankaŭ en grandanimo — (pugnigas la manojn) Ho, ĉu ne estas terure imagi al si —!

HILDE

Kio do estas tiel terura?

SOLNESS

Ke ĉion tion mi devas konstante kontraŭpezi. Pagi. Ne per mono. Sed per homa feliĉo. Kaj ne sole per mia propra feliĉo. Sed per tiu ankaŭ de aliuloj. Jes, jes, vidu *jenon*, Hilde! Tiun prezon mia artista staro kostis por mi — kaj por aliuloj. Kaj ĉiun opan tagon mi devas rigardadi, ke la prezo denove pagiĝas por mi, — kaj ĉiam denove!

HILDE

(ekstaras kaj fiksrigardas lin) Nun vi certe pensas pri — pri *ŝi*.

SOLNESS

Jes. Precipe pri Aline. Ĉar Aline — *ŝi* havis *sian* vivotaskon, ankaŭ ŝi. Same kiel mi havis la mian. (la voĉo tremas) Sed ŝia vivotasko, ĝi devis esti mistraktata, subjugata, rompata en pecojn, — por ke la mia atingu — al ia granda venko. Jes, ĉar vi sciu, ke Aline, — ŝi havis talentojn por konstrui, ankaŭ ŝi.

HILDE

Ŝi! Por konstrui?

SOLNESS

(skuas la kapon) Ne domojn kaj turojn kun pintoj — kaj tiaĵoj, pri kiuj *mi*, okupiĝas —

HILDE

Nu, pri *kio* do?

SOLNESS

(mole, en emocio) Por konstrui infananimetojn, Hilde. Konstrui infananimojn tiel ke ili povas ekstari en noblaj, belaj formoj. Tiel ke ili povus altiĝi al rektaj, maturaj homoj. *Tio ĉi* estis por kio Aline havis talenton. — Kaj ĉio tio nun nur kuŝas tie. Neuzata — kaj ne plu uzebla. Kaj neniel utila. — Ĝuste kiel la rubaĵoj post fajro.

HILDE

Jes, sed tamen se tiel estus —?

SOLNESS

Estas tiel! Estas tiel! Mi scias.

HILDE

Nu, sed *vi* almenaŭ ne estas kulpa pri tio.

SOLNESS

(fiksas la okulojn al ŝi kaj kapsignas malrapide) Nu ja, *tiu* estas la granda, terura demando. *Tiu* estas la dubo, kiu mordadas min — nokton kaj tagon.

HILDE

Tiu ĉi!

SOLNESS

Jes, supozu nun — ke mi *kulpus*. Iel.

HILDE

Vi! Pri la fajro!

SOLNESS

Pri ĉio. Pri la tuto. — Kaj eble tamen — tute senkulpa.

HILDE

(rigardas lin zorgeme) Ho, konstruestro, — dirante ion tian, vi ja tamen — tamen estas malsana.

SOLNESS

Hm, — eble mi neniam fariĝos tute sana en *tiu* rilato.

(**Ragnar Brovik** singardeme malfermas la etan pordon en la angulo maldekstre.)

(**Hilde** iras antaŭen sur la planko.)

RAGNAR

(kiam li vidas **Hilde**) Ho — Pardonu, sinjoro Solness — (Li volas retiri sin.)

SOLNESS

Ne, ne, restu. Por ke estu farite.

RAGNAR

Ho jes, — se tio eblus!

SOLNESS

Pri via patro ne pliboniĝas, mi aŭdas.

RAGNAR

Pri patro rapide graviĝas. Kaj tial mi ege petas vin, — skribu kelkajn favorajn vortojn sur unu el la folioj! Ion kion patro povas legi antaŭ ol li —

SOLNESS

(impete) Ne plu parolu al mi pri tiuj viaj desegnaĵoj!

RAGNAR

Ĉu vi rigardis ilin?

SOLNESS

Jes, — mi faris.

RAGNAR

Kaj ili ne taŭgas? Kaj ankaŭ *mi* ne taŭgas?

SOLNESS

(eviteme) Restu ĉe mi, Ragnar. Kaj vi ricevos kondiĉojn laŭ via deziro. Kaj vi povos edziĝi al Kaja. Vivi senzorge. Eble ankaŭ feliĉe. Nur ne pensu memstare konstrui.

RAGNAR

Nu ja, do mi devas iri hejmen kaj diri tion al patro. Ĉar tion mi promesis al li.
— Ĉu mi diru tion al patro — antaŭ ol li mortos.

SOLNESS

(kursuferas) Ho, diru al li, — diru al li, kion vi volas, laŭ mi. Plej bone nenion diri! (ekdire) Mi ne *povas* alie agi ol mi faras, Ragnar!

RAGNAR

Ĉu mi do povas kunpreni la desegnaĵojn?

SOLNESS

Jes, prenu ilin, — prenu ilin! Ili kuŝas tie sur la tablo.

RAGNAR

(iras tien) Dankon.

HILDE

(metas la manon sur la ujon) Ne, ne, lasu ilin.

SOLNESS

Kial?

HILDE

Jes, ĉar ankaŭ *mi* volas rigardi ilin.

SOLNESS

Sed vi ja — (al Ragnar) Do, lasu ilin kuŝi.

RAGNAR

Bonvole.

SOLNESS

Kaj iru nun hejmen al via patro.

RAGNAR

Jes, mi do faru.

SOLNESS

(kvazaŭ malespere) Ragnar, — vi ne postulu de mi ion, kion mi ne *povas*! Ĉu vi aŭdas, Ragnar! Vi ne *devas*!

RAGNAR

Ne, ne. Pardonu — (Li kapklinas kaj eliras tra la pordo en la angulo.)

(**Hilde** eksidas sur seĝon apud la spegulo.)

HILDE

(kolere rigardas al **Solness**) Jenio estis tre malbona de vi.

SOLNESS

Ĉu ankaŭ *vi* tion trovas?

HILDE

Jes, estis vere abomene. Rigore, malbone kaj ankaŭ kruele.

SOLNESS

Ho, vi ne komprenas kiel estas por *mi*.

HILDE

Tamen —. Vi ne devus esti tia.

SOLNESS

Vi ja mem ĵus diris, ke estas nur *mi* kiu rajtus konstrui.

HILDE

Tiaĵon *mi* povas diri. Sed vi ne devas.

SOLNESS

Mi pli ol iu alia. Tiel multekoste kiel mi aĉetis mian pozicion.

HILDE

Nu ja, — per io kion vi nomas endoma hejmeo — aŭ io simila.

SOLNESS

Kaj per mia anima paco aldone.

HILDE

(ekstaras) Anima paco! (intime) Nu ja, vi pravas! — Kompatinda konstruestro, — vi ja imagas al vi, ke —

SOLNESS

(kun silenta, gluglanta rido) Eksidu nun ree, Hilde. Kaj vi aŭdos komikaĵon.

HILDE

(streĉita, eksidas) Nu jes?

SOLNESS

Aspektas kiel io ridinde sensignifa. Ĉar la tuta afero temas nur pri fendeto en kamentubo, komprenu.

HILDE

Nenio alia?

SOLNESS

Ne, ne komence.

(Li translokigas sian seĝon pli proksimen al **Hilde** kaj eksidas.)

HILDE

(senpacience, frapas sian genuon) Do, la fendeto en la kamentubo!

SOLNESS

Mi rimarkis tiun fendeton en la tubo longe, longe antaŭ ol ekbrulis. Ĉiun fojon kiam mi supreniris al la subtegmento, mi ekrigardis por scii, ĉu ĝi daŭre tie *estas*.

HILDE

Kaj ĝi *estis*?

SOLNESS

Jes. Ĉar neniuj aliaj sciis pri ĝi.

HILDE

Kaj vi nenion diris?

SOLNESS

Ne, mi ne faris.

HILDE

Eĉ ne pensis pri riparo de la tubo?

SOLNESS

Certe pensis, — sed ne ekfaris. Ĉiun fojon kiam mi intencis komenci, estis kvazaŭ mano intermetis sin. Ne hodiaŭ, mi pensis. Morgaŭ. Neniam fariĝis.

HILDE

Jes, sed kial vi do tiel senzorgis!

SOLNESS

Ĉar mi pensadis. (malrapide kaj mallaŭte) Per tiu eta nigra fendo en la kamentubo mi povus eble altiĝi — kiel konstruestro.

HILDE

(rigardas antaŭ si) Certe estis streĉe.

SOLNESS

Nerezisteble. Tute nerezisteble. Ĉar tiam ĉio aspektis por mi facile kaj simple. Mi volis, ke okazu mezvintre. Iom antaŭ tagmezo. Mi estus sur la vojo veturigante Aline en la sledeto. La servistoj hejme estus ege hejtigante la fornojn —

HILDE

Jes, ĉar estus ege malvarme tiun tagon?

SOLNESS

Ege akre — ja. Kaj ili volis, ke estu varme por Aline, kiam ŝi envenus.

HILDE

Ĉar ŝi ja estas ege frostema, ŝi.

SOLNESS

Ŝi *estas*. Kaj okazus dum la veturo hejmen, ke ni vidus la fumon.

HILDE

Nur la fumon?

SOLNESS

Unue la fumon. Sed kiam ni venus al la ĝardena barilpordo, ni vidus la malnovan lignan keston en ruliĝantaj fajroflamoj. — Tiel mi deziris ke okazu, komprenu.

HILDE

Sed, je Dio, ke ĝi tiel okazus!

SOLNESS

Jes, vi diras, Hilde.

HILDE

Nu, sed aŭskultu nun, konstruestro. Ĉu vi estas tute certa, ke la fajro originis en la eta fendo en la kamentubo?

SOLNESS

Ne, kontraŭe. Mi estas tute certa, ke la fendeto en la tubo havis neniun rilaton al la fajro.

HILDE

Nu kio!

SOLNESS

Tute klare pruviĝis, ke la fajro ekflamis en vestaĵ-ĉambreto, — en tute alia parto de la domo.

HILDE

Sed kial vi do sidas tiel babiladante pri tiu fendita kamentubo!

SOLNESS

Ĉu mi rajtas paroli pli kun vi, Hilde?

HILDE

Jes, se vi nur parolos prudente, —

SOLNESS

Mi provos. (li lokigas sian seĝon pli proksimen)

HILDE

Do, ekparolu, konstruestro.

SOLNESS

(konfidence) Ĉu ne ankaŭ *vi* tion kredas, Hilde, ke ekzistas iuj selektitaj homoj, kiuj ricevis la potencon kaj kapablon *deziri* ion, *avidi* ion, *voli* ion — tiel intense kaj tiel — tiel necedigeble — ke fine ili *devas* tion akiri. Ĉu vi ne tion kredas?

HILDE

(kun nedifinebla esprimo en la okuloj) Se *tiel* estas, ni iam vidos — ĉu *mi* apartenas al tiuj selektitaj.

SOLNESS

Ne estas la memo *sola*, kiu kaŭzas tiajn grandajn reagojn. Ho ne, — la helpantoj kaj

servantoj, — ili devas ja kunagi, ankaŭ ili, se io fariĝu. Sed ili neniam venas de si mem. Oni devas ilin persiste voki. Interne en si mem do, vi komprenas.

HILDE

Kiaj helpantoj kaj servantoj estas tiuj?

SOLNESS

Ho, pri ili ni parolu alian fojon. Ni restu nun pri la fajro.

HILDE

Ĉu vi ne opinias, ke tiu fajro venus — eĉ se vi ne estus dezirinta?

SOLNESS

Se maljuna Brovik estus posedinta la domon, neniam ĝi estus brulinta tiel oportune por *li*. Pri tio mi certas. Ĉar li ne komprenas voki la helpantojn, li, kaj ankaŭ ne la servantojn. (ekstaras en maltrankvilo) Vi vidas, Hilde, ke tamen estas mia kulpo, ke la du knabetoj devis pagi per la vivo. Kaj ĉu mi ne ankaŭ kulpas pro *tio*, ke Aline ne fariĝis tio, kion ŝi devis kaj povis. Kaj kion ŝi arde volis.

HILDE

Jes, sed ĉar ja nur estas tiuj helpantoj kaj servantoj, tial —

SOLNESS

Kiu vokis la helpantojn kaj servantojn? Estis *mi*! Kaj ili venis kaj cedis al mia volo. (en kreskanta ekscito) Estas *tio*, kion homoj nomas, havi la bonŝancon kun si. Sed mi povas diri al vi, mi, kiel tiu bonŝanco sentiĝas! Ĝi sentiĝas kiel granda, senhaŭta loko ĉi tie sur la brusto. Kaj la helpantoj kaj la servantoj senhaŭtigas aliulojn por kovri *mian* vundon! — Sed la vundo tamen ne saniĝas. Neniam, — neniam! Ho, se vi scius, kiel ĝi foje suĉas kaj brulas.

HILDE

(rigardas lin atente) Vi *estas* malsana, konstruestro. Tre malsana, mi inklinas kredi.

SOLNESS

Diru *freneza*. Ĉar *tion* vi ja pensas.

HILDE

Ne, mi opinias, ke ne mankas al vi prudento.

SOLNESS

Kio do? Eldiru!

HILDE

Mi dezirus scii, ĉu vi ne naskiĝis en la mondon kun malsana konscienco.

SOLNESS

Malsana konscienco? Kia diablaĵo estas tio?

HILDE

Mi pensas, ke la konscienco en vi estas ege malforta. Tro sentema. Ne toleras ekagon. Ne kapablas levi kaj porti tion, kio estas peza.

SOLNESS

(grumbblas) Hm! Kia do la konscienco devus esti, se mi rajtas demandi?

HILDE

En vi mi dezirus, ke la konscienco estus tiel — tiel vere fortika.

SOLNESS

Ĉu? — Fortika? Nu. Ĉu vi havas fortikan konsciencon?

HILDE

Mi opinias ke *jes*. Mi ne rimarkis ion alian.

SOLNESS

Ĝi eble ne vere submetiĝis al pruvo, mi pensas.

HILDE

(kun trema tirado ĉe la buŝo) Ho, ne estis tiel facile forlasi patron, kiun mi ege amas.

SOLNESS

Ho ĉu! Por monato aŭ du —

HILDE

Mi eble neniam plu revenos hejmen.

SOLNESS

Neniam? Kial vi do forlasis lin?

HILDE

(duone serioze, duone ŝerce) Ĉu vi nun denove forgesis, ke la dek jaroj pasis?

SOLNESS

Ho babilaĵo. Ĉu estis problemoj hejme? Nu?

HILDE

(tute serioze) *Estis* tio ĉi ene en mi, kio pelis kaj vipis min ĉi tien. Eĉ logis kaj tiris min.

SOLNESS

(vigle) Jen la afero! Jen la afero, Hilde! Loĝas troloj ankaŭ en vi. Kiel en mi. Ĉar tio troviĝas interne, komprenu, — estas *tio*, kio vokas la potencojn eksterajn. Kaj tiam oni devas cedi, — ĉu vole, ĉu senvole.

HILDE

Mi preskaŭ kredas, ke vi pravas, konstruestro.

SOLNESS

(paŝadas sur la planko) Ho, estas tiel absurde multaj diabloj en la mondo, kiujn oni ne *vidas*, Hilde!

HILDE

Ankaŭ diabloj?

SOLNESS

(haltas) Bonaj diabloj kaj malicaj diabloj. Helharaj diabloj kaj nigreharaj. Se oni nur scius, ĉu estas la helharaj aŭ la nigreharaj, kiuj kaptas onin! (paŝadas) Hoho! Tiam ne estus malfacile!

HILDE

(sekvas lin per la okuloj) Aŭ se oni havus fortan, ege sanan konsciencon. Tian ke oni *kuraĝus* fari, kion oni plej arde *volus*.

SOLNESS

(haltas apud la konsoltableto) Mi opinias, ke la plimulto estas same malfortuloj kiel mi en tiu rilato.

HILDE

Povas ja esti.

SOLNESS

(apogas sin al la tablo) En la sagaoj —. Ĉu vi ion legis en tiuj malnovaj sagaoj?

HILDE

Ho jes! Dum la tempo kiam mi legis librojn, mi —

SOLNESS

En la sagaoj rakontiĝas pri vikingoj, kiuj velis al fremdaj landoj kaj rabis kaj bruligis kaj mortbatis homojn —

HILDE

Kaj rabis virinojn —

SOLNESS

— kaj tenis ilin ĉe si —

HILDE

— kaj prenis ilin hejmen sur la ŝipoj —

SOLNESS

— kaj kondukis al ili kiel — kiel la plej aĉaj troloj.

HILDE

(rigardas antaŭen kun duone vualita okulo) Ŝajnas al mi, ke *tio* estus incite.

SOLNESS

(kun mallonga, grumblanta rido) Jes, kapti virinojn, jes?

HILDE

Fariĝi rabata.

SOLNESS

(rigardas ŝin momenton) Nu, tiel.

HILDE

(kvazaŭ interrompante) Sed kien vi do celas per tiuj vikingoj, konstruestro?

SOLNESS

Jes, ĉar *tiuj* uloj, ili havis fortikan konsciencon! Kiam ili revenis hejmen, ili povis kaj vori kaj drinki. Kaj ĝojaj kiel infanoj ili ankaŭ estis. Kaj la virinoj! Multajn fojojn ili tute ne volis forlasi ilin. Ĉu vi komprenas tiaĵon, Hilde?

HILDE

Tiujn virinojn mi tre bone komprenas.

SOLNESS

Hoho! Ĉu vi eble mem povus agi sammaniere?

HILDE

Kial ne?

SOLNESS

Vivi kune — libervole kun tia perfortulo?

HILDE

Se estus perfortulo, kiun mi vere amus, —

SOLNESS

Ĉu *eblas* ami tian ulon?

HILDE

Bona Dio, oni ja ne povas regi sin por kiu oni amu, mi pensas.

SOLNESS

(rigardas ŝin penseme) Ho ne, — eble estas la trolo en ni, kiu regas *tion*.

HILDE

(kun duona rido) Kaj ankaŭ tiuj benitaj diabloj, kiujn *vi* tiel bone konas. Kaj la helharaj kaj la nigreharaj.

SOLNESS

(varme kaj silente) Do mi deziras, ke la diabloj elektu saĝe por vi, Hilde.

HILDE

Por mi ili *jam* elektis. Por ĉiam.

SOLNESS

(rigardas ŝin profunde) Hilde, — vi estas kiel sovaĝa arbarbirdo.

HILDE

Tio ne. Mi ne kaŝas min sub la arbustoj.

SOLNESS

Ne, ne. Pli kredeble estas iom de rabobirdo en vi.

HILDE

Pli ĝuste tio — eble. (en granda impeto) Kaj kial ne rabobirdo! Kial mi ne irus rabe, ankaŭ *mi*? Preni la predon, kiu min logas? Se mi do kapablas piki la ungegojn en ĝin. Venki ĝin.

SOLNESS

Hilde, — ĉu vi scias kio vi estas?

HILDE

Jes, mi ja estas tia stranga birdo.

SOLNESS

Ne. Vi estas kiel tagiĝo. Kiam mi rigardas vin, — tiam estas kvazaŭ mi rigardus al la sunleviĝo.

HILDE

Diru, konstruestro, — ĉu vi estas certa, ke vi neniam vokis min? Tiel interne?

SOLNESS

(mallaŭte kaj malrapide) Mi preskaŭ kredas ke mi estas tion farinta.

HILDE

Kion vi volis *pri* mi?

SOLNESS

Vi estas la juneco, Hilde.

HILDE

(ridetas) La juneco, kiun vi tiel timas?

SOLNESS

(kapsignas malrapide) Kaj al kiu mi profunde kore sopiras.

(**Hilde** ekstaras, iras al la eta tablo kaj serĉas la dokumentujon de **Ragnar**.)

HILDE

(etendas la ujon al li) Nun pri tiuj desegnaĵoj —

SOLNESS

(abrupte, rifuzante) Formetu tiujn aĵojn! Mi sufiĉe rigardis ilin.

HILDE

Jes, sed vi ja devas skribi ion sur ilin por li.

SOLNESS

Skribi sur ilin! Neniam en la mondo!

HILDE

Sed ĉar la bedaŭrinda maljuna viro nun kuŝas antaŭ la morto! Ĉu vi ne povas fari al li kaj al la filo ĝojon antaŭ ol ili disiĝas? Kaj eble li ankaŭ povus konstrui laŭ ili.

SOLNESS

Jes, estas ja ĝuste *tio*, kion li povas. Tion li ja certigis al si, — tiu monsinjoro.

HILDE

Sed, bona Dio, — ĉar tiel estas, — ĉu vi ne povas iomete mensogi?

SOLNESS

Mensogi? (kolere) Hilde, — foriru de mi kun tiuj diablaj desegnaĵoj!

HILDE

(tiras la ujon iomete al si) Nu, nu, nu, — ne mordu min. — Vi parolas pri troloj, vi. Ŝajnas al mi, ke vi mem kondutas kiel trolo. (ĉirkaŭrigardas) Kie vi havas plumon kaj inkon?

SOLNESS

Mi ne havas tiaĵon ĉi tie.

HILDE

(iras al la pordo) Sed ĉe la fraŭlino certe —

SOLNESS

Restu kie vi estas, Hilde! — Mi mensogu, vi diris. Nu ja, pro lia maljuna patro mi povus fari. Ĉar lin mi iam rompis. Ĵetis lin teren.

HILDE

Ankaŭ lin?

SOLNESS

Mi bezonis lokon por mi mem. Sed tiu Ragnar, — por neniun prezo li devas elstari.

HILDE

La kompatindulo, tion li ja certe ne faros. Ĉar li ja ne taŭgas —

SOLNESS

(pli proksime, rigardas ŝin kaj flustras) Se Ragnar progresos, li frapos *min* al la teron. Rompas min, — kiel mi faris al lia patro.

HILDE

Rompas *vin*? Ĉu li do taŭgas?

SOLNESS

Jes, estu certa, ke li taŭgas! Li estas la junulo, kiu staras preta por frapi la pordon al mi. Kaj forpeli la tutan konstruestron Solness.

HILDE

(rigardas lin en silenta riproĉo) Kaj vi tamen volis bari lin ekstere. Fi, konstruestro!

SOLNESS

Ĝi postulis sufiĉe da sango, la batalo, kiun mi luktis. — Kaj mi timas, ke la helpantoj kaj la servantoj ne plu obeos min.

HILDE

Vi do antaŭeniru memstare. Nenio alia eblas.

SOLNESS

Senespere, Hilde. La ŝanĝiĝo venos. Frue aŭ malfrue. La venĝo, ĝi estas senindulga.

HILDE

(en timo, kovras siajn orelojn) Tiaĵon do ne diru! Ĉu vi volas preni mian vivon! Forpreni de mi tion, kio estas pli valora ol la vivo!

SOLNESS

Kaj kio *tio* estas?

HILDE

Vidi vin granda. Vidi vin kun florkrono en la mano. Alte, alte sur preĝeja turo. (denove trankvila) Nu, prenu la krajonon. Ĉar krajonon vi certe havas?

SOLNESS

(elprenas uĵeton) Jen mi havas.

HILDE

(metas la dokumentujon sur la tablon ĉe la sofo) Bone. Kaj nun ni eksidu, ni du, konstruestro. (**Solness** eksidas ĉe la tablo)

HILDE

(malantaŭ li, klinas sin super la seĝodorson) Kaj ni skribu sur la desegnaĵojn. Vere bele kaj varme ni skribu. Por tiu malbona Roar — aŭ kiel li nomiĝas.

SOLNESS

(skribas kelkajn liniojn, turnas la kapon kaj ekrigardas ŝin) Diru al mi ion, Hilde.

HILDE
Jes?

SOLNESS
Ĉar vi nun atendadis min dum dek jaroj —

HILDE
Kio do?

SOLNESS
Kial vi ne skribis al mi? Kaj mi estus ja povinta respondi.

HILDE
(rapide) Ne, ne, ne do! Estis ja ĝuste *tio* kion mi ne deziris.

SOLNESS
Kial ne?

HILDE
Mi timis, ke *tiam* rompiĝus por mi. — Sed ni devis ja skribi sur la desegnaĵojn, konstruestro.

SOLNESS
Ni ja devis.

HILDE
(klinas sin antaŭen kaj inspektas, dum li skribas) Tiel bone kaj korvarme. Ho, kiel mi malamas — kiel mi malamas tiun Roald —

SOLNESS
(skribante) Ĉu vi neniam *vere* amis iun, vi Hilde?

HILDE
(akre) Kion vi diras?

SOLNESS
Ĉu vi neniam amis iun.

HILDE
Amis iun alian, vi sugestas?

SOLNESS
(ekrigardas ŝin) Amis iun alian, jes. Ĉu neniam? Dum ĉi tiuj dek jaroj? Neniam?

HILDE

Ho jes, foje. Kiam mi forte koleriĝis, ĉar vi ne venis.

SOLNESS

Tiam vi interesiĝis pri aliuloj?

HILDE

Iomete. Dum semajno. Bona Dio, konstruestro, vi do scias kiel tiaĵo okazas.

SOLNESS

Hilde, — kial vi venis ĉi tien?

HILDE

Ne perdigu la tempon per babilaĵo. La bedaŭrinda maljunulo povus ja morti dume.

SOLNESS

Respondu al mi, Hilde. Kion vi atendas de mi?

HILDE

Mi volas havi mian reĝlandon.

SOLNESS

Hm —

(Li ĵetas rigardon al la pordo maldekstre kaj daŭras skribi sur la desegnaĵojn.)

(**SinJORINO Solness** envenas sammomente. Ŝi kunportas iujn pakaĵojn.)

SINJORINO SOLNESS

Jen mi kunprenis ion por vi, fraŭlino Wangel. La grandaj pakoj sendiĝos poste.

HILDE

Ho, kiel kore afable de vi tamen!

SINJORINO SOLNESS

Nur simpla devo. Nenio alia.

SOLNESS

(tralegas kion li skribis) **Aline!**

SINJORINO SOLNESS

Jes?

SOLNESS

Ĉu vi vidis ĉu ŝi — la librotenistino estas tie?

SINJORINO SOLNESS

Jes, kompreneble ke *ŝi* estas tie.

SOLNESS

(metas la desegnaĵojn en la ujon) Hm —

SINJORINO SOLNESS

Ŝi staris apud la pupitro, kiel ŝi kutimas — kiam *mi* iras tra la ĉambro.

SOLNESS

(ekstaras) Mi do donos ĝin al ŝi. Kaj diros al ŝi, ke —

HILDE

(prenas de li la ujon) Ho ne, lasu min havi tiun ĝojon! (iras al la pordo, sed turnas sin) Kiel ŝi nomiĝas?

SOLNESS

Ŝi nomiĝas fraŭlino Fosli.

HILDE

Iŝ, aspektas malvarme! La baptonomon, mi petas?

SOLNESS

Kaja, — mi kredas.

HILDE

(malfermas la pordon kaj vokas eksteren) Kaja! Envenu! Rapide! La konstruestro volas paroli kun vi.

(Kaja venas internen de la pordo)

KAJA

(rigardas lin timigite) Jen mi estas —?

HILDE

(donas al ŝi la dokumentujon) Jen vidu, Kaja! Vi povas kunpreni tion ĉi. Ĉar nun la konstruestro *surskribis*.

KAJA

Ho, fine do!

SOLNESS

Donu ĝin al la maljunulo plej eble rapide.

KAJA

Mi tuj iros hejmen kun ĝi.

SOLNESS

Jes, faru. Kaj nun Ragnar povos eble konstrui.

KAJA

Ho, ĉu li rajtas veni por danki vin pro ĉio —?

SOLNESS

(akre) Mi volas neniun dankon! Salutu kaj diru *tion* de mi.

KAJA

Jes mi —

SOLNESS

Kaj diru al li, ke de nun mi ne bezonas lin. Kaj ankaŭ ne vin.

KAJA

(mallaŭte kaj treme) Ankaŭ ne min!

SOLNESS

Nun vi ja ekhavas aliajn aferojn por pripensi. Kaj prizorgi. Kaj tio estas ja nur bona. Do, iru hejmen kun la desegnaĵoj, fraŭlino Fosli. Rapide! Ĉu vi aŭdas!

KAJA

(kiel antaŭe) Jes, sinjoro Solness. (Ŝi eliras.)

SINJORINO SOLNESS

Je Dio, kiajn ruzajn okulojn ŝi havas.

SOLNESS

Ŝi! Tia azenino.

SINJORINO SOLNESS

Ho, — mi vidas kion mi vidas, mi, Halvard. — Ĉu vi vere maldungas ilin?

SOLNESS

Jes.

SINJORINO SOLNESS

Ankaŭ ŝin?

SOLNESS

Ĉu tiel ne estas laŭ via deziro?

SINJORINO SOLNESS

Sed ke vi povas malhavi *ŝin* —? Nu ja, vi certe havas iun rezerve, vi, Halvard.

HILDE

(gaje) *Mi* almenaŭ ne taŭgas por stari apud la pupitro.

SOLNESS

Nu, nu, nu, — ordiĝos, Aline. Nun vi nur pensu pri la transloĝado en la novan hejmon — plej eble rapide. Ĉi-vespere ni levos la florkronon supren — (turnas sin al **Hilde**) — tute supren sur la turpinton. Kion vi diras al *tio*, fraŭlino Hilde?

HILDE

(rigardas lin per brilaj okuloj) Estos ege ĝoje denove vidi vin tiel alte.

SOLNESS

Min!

SINJORINO SOLNESS

Ho Dio, fraŭlino Wangel, ne imagu al vi ion tian! Mia edzo —!
Tiel *kapturnema* kiel *li* estas!

HILDE

Kapturnema! Ne, tia *li* vere ne estas!

SINJORINO SOLNESS

Jes, efektive *li* estas.

HILDE

Sed mi ja mem vidis lin tute supre sur alta preĝeja turo!

SINJORINO SOLNESS

Jes, mi aŭdas homojn paroli pri *tio*. Sed tute ne eblas —

SOLNESS

(impete) Ne eblas, — ne eblas, jes! Sed mi tamen staris tie supre, mi!

SINJORINO SOLNESS

Kiel vi do povas diri tiaĵon, Halvard? Vi ja eĉ ne toleras eliri sur la balkonon ĉi tie en la supra etaĝo. Tia vi ja ĉiam estis.

SOLNESS

Vi eble spertos ion alian ĉi-vespere.

SINJORINO SOLNESS

(timigita) Ne, ne, ne! Tion mi ja, je Dio, neniam vidos! Ĉar mi tuj skribos al la doktoro. Kaj li certe deturnos vin.

SOLNESS

Sed Aline do —!

SINJORINO SOLNESS

Jes, ĉar vi ja estas malsana, Halvard! Tio ĉi *ne povas* esti io alia! Ho Dio, — ho Dio! (Ŝi eliras rapide dekstre.)

HILDE

(rigardas lin atente) Ĉu *estas* tiel, aŭ ĉu ne?

SOLNESS

Ke mi estas kapturnema?

HILDE

Ke *mia* konstruestro ne *kuraĝas*, ne *povas* grimpi tiel alte kiel li mem konstruas?

SOLNESS

Ĉu tiel vi rigardas la aferon?

HILDE

Jes.

SOLNESS

Aspekte neniuj anguloj en mi povas esti sekura kontraŭ vi.

HILDE

(rigardas tra la orielfenestro) Tie supre do. Tute supre —

SOLNESS

(proksimiĝas) En la plej supra turĉambreto vi povus loĝi, Hilde. — Povus loĝi *tie* kiel princino.

HILDE

(nedifineble, inter seriozeco kaj ŝerco) Jes, tion vi ja promesis al mi.

SOLNESS

Ĉu mi vere *faris*?

HILDE

Fi, konstruestro! Vi diris, ke mi fariĝu princino. Kaj ke mi ricevu reĝlandon de vi. Kaj tiam vi — Nu!

SOLNESS

(konsidereme) Ĉu vi estas tute certa, ke ne estas ia revo, — ia imagaĵo, kiu fiksiĝis en vi?

HILDE

(akre) Ĉar eble vi ne *faris*?

SOLNESS

Mi apenaŭ mem scias —. (pli mallaŭte) Sed *tion* mi nun scias, ke mi —

HILDE

Ke vi —? Diru tuj!

SOLNESS

— ke mi estus *devinta* tion fari.

HILDE

(en brava ekkrio) Neniam en la mondo vi estas kapturnema!

SOLNESS

Ĉi-vespere ni do suprenlevos la florkronon, — princino Hilde.

HILDE

(kun amara trajto) Super via nova hejmo, jes.

SOLNESS

Super la nova domo, kiu neniam fariĝos *hejmo* por *mi*.

(Li eliras tra la ĝardenpordo)

HILDE

(rigardas antaŭen kun vualita okulo kaj flustras al si mem. Aŭdiĝas nur la vortoj:) — — — — terure ekscite — —

TRIA AKTO

(Granda, vasta verando, apartenanta al la loĝdomo de **konstruestro Solness**. Parto de la domo kun elirpordo al la verando vidiĝas maldekstre. Balustrado antaŭ tiu ĉi dekstre. Tute fone, sur la malvasta flanko de la verando, ŝtuparo kondukas al la pli malalte situanta ĝardeno. Grandaj, maljunaj arboj en la ĝardeno etendas siajn branĉojn super la verando kaj al la domo. Plej dekstre, inter la arboj, ekvidiĝas la suba parto de la nova vilao kun skafaldo ĉirkaŭ la turkonstruaĵo. En la fono la ĝardeno limiĝas de malnova kradbarilo. Ekster la barilo estas strato kun malaltaj, kadukaj dometoj.)

(Vesperĉielo kun sunbriligitaj nuboj.)

(Sur la verando staras ĝardena benko laŭ la muro de la domo, kaj antaŭ la benko longa tablo. Apud la alia flanko de la tablo estas apogseĝo kaj kelkaj taburetoj. Ĉiuj mebloj estas korbfarista plektaĵo.)

(**SinJORINO Solness**, envolvita en blanka krepŝalo, ripozas en la apogseĝo rigardante dekstren.)

(Iom poste **Hilde Wangel** venas supren la ŝtuparon de la ĝardeno. Ŝi estas same vestita kiel antaŭe, kaj portas ĉapelon sur la kapo. Sur la brusto ŝi portas etan bukedon el ordinaraĵoj floretoj.)

SINJORINO SOLNESS

(turnas la kapon iomete) Ĉu vi ĉirkaŭiris en la ĝardeno, fraŭlino Wangel!

HILDE

Jes, mi ĉirkaŭrigardis tie.

SINJORINO SOLNESS

Kaj ankaŭ trovis florojn, mi vidas.

HILDE

Ho jes! Ĉar ili abundas. Inter la arbustoj.

SINJORINO SOLNESS

Ho *ĉu*? Ankoraŭ? Jes, ĉar mi tien preskaŭ neniam venas.

HILDE

(pli proksime) Ĉu vere! Vi do ne kuras en la ĝardenon ĉiun tagon?

SINJORINO SOLNESS

(kun laca rideto) Mi ne plu ien “kuras”, mi. *Nun* ne plu.

HILDE

Nu, sed ĉu vi neniam foje iras por saluti la belaĵojn, kiuj *tie* troviĝas?

SINJORINO SOLNESS

Ĉio fremdiĝis por mi. Mi preskaŭ timas la revidon.

HILDE

Vian propran ĝardenon!

SINJORINO SOLNESS

Ŝajnas al mi, ke ĝi ne plu aspektas la *mia*.

HILDE

Ho, kial tiel —?

SINJORINO SOLNESS

Ne, ĝi ne estas. Ne estas kiel en la tempo de patro kaj patrino. Nun ili bedaŭrinde forprenis tiom multe de la ĝardeno, fraŭlino Wangel. Imagu, — ili parceligis, — kaj konstruis domojn por fremdaj homoj. Homoj, kiujn mi ne konas. Kaj *ili* povas sidi rigardante min tra siaj fenestroj.

HILDE

(kun hela esprimo) Sinjorino Solness?

SINJORINO SOLNESS

Jes?

HILDE

Permesu al mi iomete restadi ĉe vi?

SINJORINO SOLNESS

Jes volonte, se vi emas.

(**Hilde** translokigas tabureton al la apogseĝo kaj eksidas.)

HILDE

Ah, — ĉi tie oni povas sidi sunumante sin kiel kato.

SINJORINO SOLNESS

(metas la manon facile sur ŝian nukon) Ĝentile ke vi volas sidi ĉe *mi*. Mi kredus, ke vi enirus al mia edzo.

HILDE

Kion mi farus ĉe li?

SINJORINO SOLNESS

Helpi lin, mi pensis.

HILDE

Ne dankon. Cetere li ne estas interne. Li iras tie kun la laboristoj. Sed li aspektis tiel mordeme, ke mi ne kuraĝis paroli al li.

SINJORINO SOLNESS

Ho, funde li estas milda kaj mola en la animo.

HILDE

Li!

SINJORINO SOLNESS

Vi ankoraŭ ne vere konas lin, vi, fraŭlino Wangel.

HILDE

(rigardas ŝin varme) Ĉu vi ĝojas nun, ĉar vi transloĝiĝos en la novan domon?

SINJORINO SOLNESS

Mi *devus* ja ĝoji. Ĉar Halvard ja deziras —

HILDE

Ho, ne ĝuste pro tio, mi pensas.

SINJORINO SOLNESS

Jes, jes, fraŭlino Wangel. Ĉar estas ja nur mia devo, tio, subigi min al *li*. Sed ofte sentiĝas malfacile devigi sian animon al obeemo.

HILDE

Jes, *tio* certe sentiĝas malfacile.

SINJORINO SOLNESS

Jes imagu. Kiam oni ne estas pli bona homo ol mi, jen —

HILDE

Kiam oni travivis tiom da pezaĵoj, kiel vi —

SINJORINO SOLNESS

Kiel *vi* tion scias?

HILDE

Via edzo diris.

SINJORINO SOLNESS

Al mi li malofte tuŝas *tiujn* aferojn. — Jes, kredu, ke mi travivis sufiĉe multe dum mia vivo, *mi*, fraŭlino Wangel.

HILDE

(rigardas ŝin kompateme kaj malrapide kapsignas) Kompatinda sinjorino Solness. Unue brulis por vi —

SINJORINO SOLNESS

(kun suspiro) Jes, ĉio *mia* brulis.

HILDE

Kaj poste sekvis tio pli grava.

SINJORINO SOLNESS

(rigardas ŝin demande) Pli grava?

HILDE

La plej afliktiga.

SINJORINO SOLNESS

Al kio vi aludas?

HILDE

(silente) Vi ja perdis ambaŭ knabetojn.

SINJORINO SOLNESS

Ho, ili, jes. Jes, vidu, *tiu* estis *aparta* afero, tiu. Estis ja elĉiela sorto. Kaj al tiaĵo oni devas sin kurbi. Kaj aldone danki.

HILDE

Ĉu vi tion faras?

SINJORINO SOLNESS

Ne ĉiam, bedaŭrinde. Mi ja bone scias, ke estas mia devo. Sed tamen mi ne *povas*.

HILDE

Nu ja, estas kompreneble, mi pensas.

SINJORINO SOLNESS

Kaj ofte mi devas diri al mi mem, ke estis justa puno por mi —

HILDE

Kial?

SINJORINO SOLNESS

Ĉar mi ne estis sufiĉe persista en la malfeliĉo.

HILDE

Sed mi ne komprenas, ke —

SINJORINO SOLNESS

Ho ne, ne, fraŭlino Wangel, — ne parolu pli pri tiuj du knabetoj. Pri ili ni nur ĝoju. Ĉar *ili* ja estas feliĉaj, — feliĉaj nun. Estas ja la *malgrandaj* perdoj en la vivo, kiuj tiel akre ŝiras la koron. Perdi ĉion, kion aliaj homoj kalkulas por nenio.

HILDE

(metas la brakojn sur ŝian genuon kaj rigardas al ŝi varme) Dolĉa sinjorino Solness, — diru al mi, kio *tio* estas!

SINJORINO SOLNESS

Kiel mi diras. Nur etaj aĝoj. Brulis ja ĉiuj la malnovaj portretoj sur la muroj. Kaj ĉiuj la malnovaj silkaj kostumoj brulis. Tiuj kiu apartenis al la familio dum longaj tempoj. Kaj ĉiuj puntaĵoj de patrino kaj avino — ankaŭ ili brulis. Kaj imagi, — la juveloj! (peze) Kaj ĉiuj pupoj.

HILDE

Pupoj?

SINJORINO SOLNESS

(plorsufoke) Mi havis naŭ delikatajn pupojn.

HILDE

Kaj ankaŭ *ili* brulis?

SINJORINO SOLNESS

Ĉiuj. Ho, estis korŝire, — korŝire por mi.

HILDE

Ĉu vi do konservis ĉiujn tiujn pupojn? Ekde infaneco?

SINJORINO SOLNESS

Ne konservis. Mi kaj la pupoj, ni kunvivadis ankaŭ poste.

HILDE

Post kiam vi fariĝis plenkreska?

SINJORINO SOLNESS

Jes, longe post *tiu* tempo.

HILDE

Ankaŭ post kiam vi edziniĝis?

SINJORINO SOLNESS

Ho jes. Kiam li nur ne vidis, tiam — Sed ili ja forbrulis, la malfeliĉuloj. Neniu pensis savi *ilin*. Ho, estas triste imagi. Jes, ne ridu pri mi, fraŭlino Wangel.

HILDE

Mi tute ne ridas.

SINJORINO SOLNESS

Ĉar iel estis ja vivo en ili. Mi portis ilin sub mia koro. Kvazaŭ etajn nenaskitajn infanojn.

(**Doktoro Herdal**, kun la ĉapelo en la mano, elvenas tra la pordo kaj ekvidas la **sinjorinon Solness** kaj **Hilde**.)

DOKTORO HERDAL

Nu, vi do sidas ekstere kaptante malvarmumon, sinjorino?

SINJORINO SOLNESS

Mi trovas, ke estas bone kaj varme hodiaŭ.

DOKTORO HERDAL

Jes, jes. Sed ĉu io okazos en la domo? Mi ricevis letereton de vi.

SINJORINO SOLNESS

(ekstaras) Jes, estas io priparolenda kun vi.

DOKTORO HERDAL

Bone. Ni do eniru. (al **Hilde**) En montara uniformo ankaŭ hodiaŭ, fraŭlino?

HILDE

(gaje, ekstaras) Ho jes! Plene ekipita! Sed hodiaŭ mi ne supreniros por rompi la nukon. Ni du bone restos malsupre por rigardi, ni, doktoro.

DOKTORO HERDAL

Kion ni rigardu?

SINJORINO SOLNESS

(silente, timigite al **Hilde**) Tŝ, tŝ, — je Dio! Jen li venas! Provu *deturni* lin de tiu kaprico.
Kaj ni estu amikinoj, fraŭlino Wangel. Ĉu ne?

HILDE

(impete ĵetas sin al ŝia kolo) Ho, se ni nur povus.

SINJORINO SOLNESS

(liberigas sin atente) Nu—nu—nu! *Jen* li venas, doktoro! Mi parolu kun vi.

DOKTORO HERDAL

Ĉu temas pri *li*?

SINJORINO SOLNESS

Jes, certe *li*. Envenu.

(Ŝi kaj la **doktoro** iras en la domon)

(En la posta momento **konstruestro Solness** venas de la ĝardeno supren laŭ la ŝtuparo. Serioza mieno kaptas la vizaĝon de **Hilde**)

SOLNESS

(Ekrigardas al la pordo, kiu zorge fermiĝas de interne.) Ĉu vi *tion* rimarkis, Hilde, ke tuj kiam mi venas, ŝi foriras?

HILDE

Mi rimarkis, ke tuj kiam vi venas, vi *igas* ŝin foriri.

SOLNESS

Eble tiel. Sed mi ne povas ion ŝanĝi. (rigardas ŝin atente) Ĉu vi frostas, Hilde? Vi tiel aspektas.

HILDE

Mi ĵus elvenis de tombeja kelo.

SOLNESS

Kion vi aludas per *tio*?

HILDE

Ke frostas en mia korpo, konstruestro.

SOLNESS

(malrapide) Mi kredas, ke mi komprenas —

HILDE

Kion vi volas ĉi tie nun?

SOLNESS

Mi ekvidis vin de *tie* fore.

HILDE

Sed tiam vi ja ankaŭ vidis ŝin?

SOLNESS

Mi sciis, ke ŝi volus tuj foriri, se mi venus.

HILDE

Ĉu estas aflikte por vi, ke ŝi tiel evitas vin?

SOLNESS

Iel tio ankaŭ sentiĝas kiel malpeziĝo.

HILDE

Ke vi ne havas ŝin rekte antaŭ la okuloj?

SOLNESS

Jes.

HILDE

Ke vi ne ĉiame vidas, kiel peze ŝi prenas tion ĉi pri la knabetoj?

SOLNESS

Jes. Precipe tial.

(**Hilde** paŝadas sur la verando kun la manoj surdorse, ekstaras ĉe la balustrado kaj rigardas eksteren sur la ĝardenon.)

SOLNESS

(post ioma paŭzo) Vi parolis longe kun ŝi, ĉu?

HILDE

(staras senmove kaj ne respondas)

SOLNESS

Ĉu *longe*, mi demandas.

HILDE

(silentas kiel antaŭe)

SOLNESS

Pri kio ŝi parolis, Hilde?

HILDE

(daŭre silentas)

SOLNESS

Kompatinda Aline! Certe estis pri la knabetoj.

HILDE

(skuiĝas nervoze; rapide ŝi kapsignas kelkajn fojojn.)

SOLNESS

Neniam supervenkos. Neniam en la mondo ŝi supervenkos. (proksimiĝas) Nun vi denove staras tie kiel ŝtona statuo. Tiel vi staris ankaŭ hieraŭ vespere.

HILDE

(turnas sin kaj rigardas lin per grandaj, seriozaj okuloj) Mi volas forvojaĝi.

SOLNESS

(akre) Forvojaĝi!

HILDE

Jes.

SOLNESS

Sed tion mi ne permesas.

HILDE

Kion mi nun faru *ĉi tie*?

SOLNESS

Nur *esti* ĉi tie, Hilde!

HILDE

(rigardas lin de supre malsupren) Nu, dankon. Fariĝis ja ne *tiel*.

SOLNESS

(senpripense) Des pli bone!

HILDE

(impete) Mi ne *povas* fari malbonon kontraŭ iu, kiun mi *konas*! Ne forpreni ion, kio apartenas al ŝi.

SOLNESS

Kiu diras, ke vi *tion* faru!

HILDE

(daŭre) Kontraŭ iu fremda, konsentite! Ĉar *tio* estas io tute alia! Kontraŭ iu kiun mi neniam vidis antaŭ miaj okuloj. Sed kontraŭ iu al kiu mi proksimiĝis —! Ho ne! Ne do! Uŝ!

SOLNESS

Jes, sed ion alian mi ja ne diris!

HILDE

Ho, konstruestro, vi certe bone scias, kiel evoluus. Kaj tial mi forvojaĝos.

SOLNESS

Kaj kio fariĝos el *mi*, kiam vi estos foririnta? Por kio mi *tiam* vivu? Poste?

HILDE

(kun la nedifinebla esprimo en la okuloj) Pri *vi* ne estas zorgo. Vi havas ja viajn devojn por ŝi. Vivu por tiuj devoj.

SOLNESS

Tro malfrue. Tiuj potencoj, — tiuj — tiuj —

HILDE

— la diabloj —

SOLNESS

Jes, la diabloj! Kaj ankaŭ la trolo ene en mi. Ili suĉis el ŝi la vivsangon. (ridas senespere) Pro *mia feliĉo* ili tion faris! Jes—jes! (peze) Kaj nun ŝi estas morta — pro mi. Kaj mi estas viva katenita al tiu mortinto. (en sovaĝa timo) *Mi* — *mi*, kiu ne *povas* vivi la vivon sen ĝojo!

(**Hilde** ĉirkaŭiras la tablon kaj eksidas sur la benkon kun la kubutoj sur la tablotabulo kaj kun la kapo apogata en la manoj.)

HILDE

(sidas momenton lin rigardante) Kion vi do konstruos venontan fojon?

SOLNESS

(skuas la kapon) Mi ne kredas, ke de nun multe pli fariĝos.

HILDE

Ne tiaj hejmecaj, feliĉaj hejmoj por patrino kaj patro? Kaj por la infanaro?

SOLNESS

Mi ŝatus scii ĉu por tio fariĝos bezono estonte.

HILDE

Kompatinda konstruestro! Kaj vi kiu pasigis ĉi tiujn dek jarojn — dediĉante la vivon — nur por *tio*!

SOLNESS

Nu ja, vi parolas, Hilde.

HILDE

(ekscite) Ho, aspektas al mi stulte, stulte, — ĉio!

SOLNESS

Kiu ĉio?

HILDE

Ke oni ne kuraĝas kapti sian propran feliĉon. Sian propran vivon! Nur ĉar staras io konata en la vojo!

SOLNESS

Iu preter kiu oni ne rajtas pasi.

HILDE

Mi dezirus scii, ĉu oni ne funde *rajtus* tion fari? Sed tamen —. Ho, esti tiu kiu povus fordormi el la tuto!

(Ŝi metas la brakojn plate sur la tablon, ripozigas la maldekstran flankon de la kapo en la manojn kaj fermas la okulojn.)

SOLNESS

(turnas la apogseĝon kaj eksidas ĉe la tablo) Ĉu *vi* havis hejmecan, feliĉan hejmon — norde ĉe via patro, Hilde?

HILDE

(senmove, respondas kvazaŭ duone en dormo) Nur kaĝon mi havis.

SOLNESS

Kaj tien vi tute ne volas reveni?

HILDE

(kiel antaŭe) La birdo de la arbaro ne volas reiri en la kaĝon.

SOLNESS

Prefere ĉasi en la libera aero —

HILDE

(daŭre kiel antaŭe) La rabobirdo prefere ĉasas —

SOLNESS

(tenas la rigardon kuŝanta sur ŝi) Ke oni havus vikingan spiton en la vivo —

HILDE

(kun ordinara voĉo, malfermas la okulojn, sed ne movas sin) Kaj la aliaĵo? Kio *tio* estus!

SOLNESS

Fortika konscienco.

(**Hilde** vigle rektigas sin sur la benko. Ŝiaj okuloj denove havas la ĝojan, brilan esprimon.)

HILDE

(kapsignas al li) Mi scias, kion vi konstruos venontan fojon, mi!

SOLNESS

Jen vi scias pli ol mi, Hilde.

HILDE

Jes, la konstruestroj, ili ja estas tiel stultaj, ili.

SOLNESS

Kaj kio tio do estos?

HILDE

(kapsignas denove) La kastelo.

SOLNESS

Kiu kastelo?

HILDE

Mia kastelo, kompreneble.

SOLNESS

Vi nun volas havi kastelon?

HILDE

Ĉu vi ne ŝuldas al mi reĝlandon, mi demandas?

SOLNESS

Jes, mi aŭdas vin diri tion.

HILDE

Nu. Vi do ŝuldas al mi tiun reĝlandon. Kaj al reĝlando apartenas kastelo, mi opinius!

SOLNESS

(pli kaj pli gajigita) Jes, ordinare estas ja tiel.

HILDE

Bone; do konstruu ĝin por mi! Tuj!

SOLNESS

(ridas) Tuj dum horo?

HILDE

Jes! Ĉar nun ili pasis, — la dek jaroj. Kaj mi ne plu volas atendadi. Do, — eligu la kastelon, konstruestro!

SOLNESS

Ne estas facile esti *via* ŝuldanto, Hilde.

HILDE

Tion vi devus pripensi pli frue. Nun estas tro malfrue. Do — (frapas la tablon) — surtabligu la kastelon! Estas *mia* kastelo! Mi volas ĝin *tuj* havi!

SOLNESS

(pli serioze, klinas sin pli proksimen, kun la brakoj sur la tablo) Kia vi imagas la kastelon, Hilde?

(Ŝia okulo vualigâs iom post iom. Ŝi kvazaŭ rigardas en si mem.)

HILDE

(malrapide) Mia kastelo situu alte. Tre alte ĝi kuŝu. Kaj libere al ĉiuj flankoj. Por ke mi vidu vaste, — vaste eksteren.

SOLNESS

Kaj alta turo estu, ĉu?

HILDE

Terure alta turo. Kaj tute supre sur la turo estu altano. Kaj sur *ĝi* mi volas stari —

SOLNESS

(senvole tuŝas sian frunton) Ke vi ŝatas stari tiel vertiĝe alte —

HILDE

Ho jes! Ĝuste tie supre mi volas stari rigardante la aliulojn, — tiujn, kiuj konstruas preĝejojn. Kaj hejmojn por patrino kaj patro kaj la infanaro. Kaj tion ankaŭ *vi* supreniru por rigardi.

SOLNESS

(mallaŭte) La konstruestro, ĉu li rajtas suprenveni al la princino?

HILDE

Se la konstruestro *volas*.

SOLNESS

(pli mallaŭte) Do mi kredas, ke la konstruestro venos.

HILDE

(kapsignas) La konstruestro, — li venos.

SOLNESS

Sed neniam plu konstruos, — kompatinda konstruestro.

HILDE

(vigle) Ho jes! Ni du laboru kune. Kaj ni konstruos la plej belan, — la plej delikatan en la tuta mondo.

SOLNESS

(ekscita) Hilde, — diru al mi kio tio estas!

HILDE

(rigardas lin ridete, iomete skuas la kapon, pintigas la buŝon kaj parolas kvazaŭ al infano) La konstruestroj, — ili estas iuj tre — tre stultaj homoj.

SOLNESS

Jes, certe ili estas stultaj, jes. Sed diru do al mi, kio tio estas! La plej delikata en la mondo. Kion ni du konstruos kune?

HILDE

(silentas iomete kaj diras per nedifinebla esprimo en la okuloj) Aerkasteloj.

SOLNESS

Aerkasteloj?

HILDE

(kapjesas) Aerkasteloj, jes! Ĉu vi scias, kio tia aerkastelo estas?

SOLNESS

Estas ja la plej delikata en la mondo, vi diras.

HILDE

(ekstaras ekscite kaj frapas kvazaŭ rifuze per la mano) Nu ja, certe ja! Aerkasteloj, — ili estas konvenaj por rifuĝo. Kaj ankaŭ konvene facilaj por konstrui — (rigardas lin moke) — prefere por tiuj konstruestroj, kiuj havas kapturnigitan konsciencon.

SOLNESS

(ekstaras) Post tiu ĉi tago ni du konstruos kune, Hilde.

HILDE

(kun duone dubema rideto) Tian *veran* aerkastelon?

SOLNESS

Jes. Kun fundamento sube.

(**Ragnar Brovik** venas el la domo. Li portas grandan verdan florkronon kun floroj kaj silkaj rubandoj.)

HILDE

(ĝojkrie) La florkrono! Ho, kiel terure rava!

SOLNESS

(mire) Ĉu estas *vi* kiu venas kun la florkrono, Ragnar?

RAGNAR

Mi promesis al la laborestro.

SOLNESS

(malpezigita) Nu, do certe pliboniĝis pri via patro?

RAGNAR

Ne.

SOLNESS

Ĉu ne vigligis lin, kion mi skribis?

RAGNAR

Venis tro malfrue.

SOLNESS

Tro malfrue!

RAGNAR

Kiam ŝi venis kun ĝi, li ne plu konsciiĝis. Li ekhavis apopleksion.

SOLNESS

Sed iru do hejmen al li! Zorgu pri via patro.

RAGNAR

Li ne plu bezonas min.

SOLNESS

Sed vi certe bezonas esti ĉe li.

RAGNAR

Ŝi sidas ĉe lia lito.

SOLNESS

(iom necerte) Kaja?

RAGNAR

(rigardas lin sombre) Jes, — Kaja, jes.

SOLNESS

Iru hejmen, Ragnar. Kaj al li kaj al ŝi. Donu al *mi* la florkronon.

RAGNAR

(subpremante mokan rideton) Vi do ne mem volas —?

SOLNESS

Mi mem portos ĝin loken. (prenas de li la florkronon) Kaj iru hejmen, vi. Ni ne bezonas vin hodiaŭ.

RAGNAR

Mi scias, ke de nun vi ne bezonas min. Sed hodiaŭ mi restos.

SOLNESS

Nu, do restu se vi nepre volas.

HILDE

(ĉe la balustrado) Konstruestro, — ĉi tie mi volas stari vin rigardante.

SOLNESS

Min!

HILDE

Estos terure ekscite.

SOLNESS

(mallaŭte) Pri tio ni du parolos poste, Hilde.

(Li iras kun la florkrono malsupren laŭ la ŝtuparo kaj foren tra la ĝardeno.)

HILDE

(postrigardas lin; poste ŝi turnas sin al **Ragnar**.) Vi devus do almenaŭ danki lin, mi pensas.

RAGNAR

Danki lin? Ĉu mi dankus *lin*?

HILDE

Jes, vi ja vere devus!

RAGNAR

Estus pli ĝuste danki vin.

HILDE

Kial vi diras tiaĵon?

RAGNAR

(ne respondante al ŝi) Sed estu singarda, fraŭlino! Ĉar vi ankoraŭ ne konas *lin* bone.

HILDE

(fajre) Ho, estas mi, kiu konas lin plej bone!

RAGNAR

(ridas en kolero) Danki lin, kiu tenis min malsupre jaron post jaro! Lin, kiu igis mian patron dubi pri mi. Igis min mem dubi —. Kaj ĉio nur por ke —!

HILDE

(kvazaŭ ion suspektante) Por ke —? Diru tuj!

RAGNAR

Por povi teni ŝin ĉe si.

HILDE

(ekpaŝas al li) La fraŭlinon ĉe la pupitro!

RAGNAR

Jes.

HILDE

(minacante, per punitaj manoj) Ne estas vero! Vi mensogas pri li!

RAGNAR

Ankaŭ mi ne volis tion kredi antaŭ hodiaŭ, — kiam ŝi mem rakontis.

HILDE

(kvazaŭ ekster si mem) *Kion* ŝi diris! Mi volas scii! Tuj! Tuj!

RAGNAR

Ŝi diris, ke li prenis ŝian animon — tute kaj plene. Prenis ŝiajn pensojn sole por si. Ŝi diras, ke ŝi neniam povos lasi lin. Ke ŝi volas resti ĉi tie, kie *li* estas —

HILDE

(kun fajraj okuloj) Ŝi ne rajtas!

RAGNAR

(kvazaŭ explore) Pro kiu ŝi ne rajtas?

HILDE

(rapide) Ankaŭ ne pro *li*!

RAGNAR

Ho ne, — mi ja bone komprenas ĉion nun. De nun ŝi eble nur — ĝenus.

HILDE

Ne ĉion vi komprenas — parolante tiel! Ne, *mi* diru al vi, kial li retenis ŝin.

RAGNAR

Kaj kial do?

HILDE

Por reteni *vin*.

RAGNAR

Ĉu li diris tion al vi?

HILDE

Ne, sed estas *tiel*! *Devas* esti tiel! (sovaĝe) Mi volas, — mi volas, ke estu tiel!

RAGNAR

Kaj ĝuste kiam vi venis, — li malkaptis ŝin.

HILDE

Vin, — *vin* li malkaptis! Ĉu vi kredas, ke li pensas pri tiaj fremdaj fraŭlinoj, li?

RAGNAR

(pripensas) Ĉu li timadis min?

HILDE

Li timadis? Tiel orgojla vi ne estu, mi pensas.

RAGNAR

Ho, li ja antaŭ longe estus devinta kompreni, ke ankaŭ mi taŭgas al io, mi. — Cetere, — *timema*, — estas ĝuste *tio*, kio li estas, vi sciu.

HILDE

Li! Imagu al mi *tion*!

RAGNAR

Iel li estas timema. Li, la granda konstruestro. Rabi la vivfeliĉon de aliaj homoj, — kiel li faris pri mia patro kaj mi, — pri tio li ne timas. Sed nur tio, grimpis supren sur iu skafaldeto, — de *tio* li petus Dion protekti sin!

HILDE

Ho, vi devus esti vidinta lin tiel alte supre, — tiel vertiĝe alte, kiel mi lin iam vidis!

RAGNAR

Ĉu vi vidis?

HILDE

Jes, mi vere faris. Tiel libera kaj fiera kiel li staris fiksante la florkronon al la ventomontrilo!

RAGNAR

Mi scias, ke unu fojon en sia vivo li kuraĝis. Unu solan fojon. Ni junuloj ofte parolis pri tio. Sed neniuj potenco en la mondo igos lin fari tion denove.

HILDE

Hodiaŭ li faros denove!

RAGNAR

(moke) Ho, vi kredu tion!

HILDE

Ni vidos!

RAGNAR

Nek vi nek mi tion vidos.

HILDE

(furioze, senbride) Mi *volas* vidi! Mi *volas* kaj mi *devas* vidi!

RAGNAR

Sed li ne faros. Simple ne kuraĝos. Ĉar li ja havas tiun difekton, — li, la granda konstruestro.

(**SinJORINO SolNESS** elvenas de la domo eksteren sur la verando.)

SINJORINO SOLNESS

(ĉirkaŭrigardas) Ĉu li ne ĉeestas? Kien li iris?

RAGNAR

La konstruestro estas tie ĉe la laboristoj.

HILDE

Li iris kun la florkrono.

SINJORINO SOLNESS

(en timo) Kun la florkrono! Ho Dio, — ho Dio! Brovik, — iru al li! Sendu lin ĉi tien!

RAGNAR

Ĉu mi diru, ke la sinjorino volas paroli kun li?

SINJORINO SOLNESS

Ho jes, kara, faru. — Ne, ne, — ne diru ke *mi* volas ion! Diru, ke *estas* iu. Kaj ke li devas tuj veni.

RAGNAR

Bone. Mi faros, sinjorino.

(Li iras malsupren la ŝtuparon kaj for tra la ĝardeno.)

SINJORINO SOLNESS

Ho, fraŭlino Wangel, vi ne povas imagi kian timon mi suferas pro li.

HILDE

Sed ĉu tio ĉi estas tiel timiginda?

SINJORINO SOLNESS

Ho jes, kompreneble. Imagu se li serioze faros! Se li ekpensas supreniri la skafaldon!

HILDE

(ekscitite) Ĉu vi kredas, ke li faros?

SINJORINO SOLNESS

Ho, oni neniam povas scii kion li povus ekpensi. Li povus fari kion ajn.

HILDE

Aha, ankaŭ *vi* opinias, ke li estas — tia —?

SINJORINO SOLNESS

Ho, mi ne plu scias, kion opinii pri li. Ĉar la doktoro ja rakontis al mi tiome. Kaj kiam mi tion kunmetas kun iaĵoj, kiujn mi aŭdis lin diri —

(**Doktoro Herdal** ekrigardas tra la pordo)

DOKTORO HERDAL

Ĉu li ne baldaŭ venos?

SINJORINO SOLNESS

Jes, mi pensas. Mi almenaŭ sendis por voki lin.

DOKTORO HERDAL

(pli proksime) Sed vi ja devas eniri, vi, sinjorino —

SINJORINO SOLNESS

Ne, ne. Mi restos ĉi tie por atendi Halvard.

DOKTORO HERDAL

Jes, sed venis kelkaj sinjorinoj al vi —

SINJORINO SOLNESS

Ho Dio, ankaŭ *tio*! Kaj ĝuste nun!

DOKTORO HERDAL

Venis iuj, kiuj diras, ke ili nepre volas rigardi la solenaĵon.

SINJORINO SOLNESS

Jes-ja, mi do tamen devas eniri al ili. Ĉar estas ja mia devo.

HILDE

Ĉu vi ne povas peti tiujn sinjorinojn foriri?

SINJORINO SOLNESS

Neeblas. Ĉar ili ja jam venis, estas mia devo akcepti ilin. Sed restu vi ĉi tie dume, — por akcepti lin, kiam li venos.

DOKTORO HERDAL

Kaj retenu lin per babilaĵo tiom longe kiel eble —

SINJORINO SOLNESS

Jes, faru, kara fraŭlino Wangel. Retenu lin tiel firme kiel vi povas.

HILDE

Ĉu ne estus pli ĝuste, ke vi mem farus?

SINJORINO SOLNESS

Jes, je Dio, — estus ja *mia* devo. Sed kiam oni havas devojn multflanke, tiam —

DOKTORO HERDAL

(rigardas al la ĝardeno) Jen li venas!

SINJORINO SOLNESS

Kaj imagu, — mi kiu devas eniri!

DOKTORO HERDAL

(al **Hilde**) Ne menciŭ ke *mi* ĉeestas.

HILDE

Ne, mi certe trovos alian paroltemon kun la konstruestro.

SINJORINO SOLNESS

Kaj nepre retenu lin. Mi opinias, ke estas *vi*, kiu kapablas.

(**SinJORINO Solness** kaj **doktoro Herdal** iras en la domon. **Hilde** restas staranta sur la verando.)

(**Konstruestro Solness** venas de la ĝardeno supren laŭ la ŝtuparo)

SOLNESS

Laŭdire estas iu, kiu serĉas min, mi aŭdas.

HILDE

Jes, tiu estas mi, konstruestro.

SOLNESS

Ho, ĉu estas vi, Hilde. Mi timis, ke estus Aline kaj la doktoro.

HILDE

Aspekte vi estas tre timema, vi!

SOLNESS

Ĉu vi tion kredas?

HILDE

Jes, homoj diras, ke vi timas grimpi — ekzemple la skafaldojn.

SOLNESS

Nu, tio estas ja aparta afero, tio.

HILDE

Sed timema, — vi do estas?

SOLNESS

Jes, mi estas.

HILDE

Timas ke vi falos kaj mortfrapiĝos?

SOLNESS

Ne, tiel ne.

HILDE

Kiel do?

SOLNESS

Mi timas la venĝon, Hilde.

HILDE

La venĝon? (skuas la kapon) Tion mi ne komprenas.

SOLNESS

Eksidu. Kaj mi rakontos ion al vi.

HILDE

Jes, faru! Tuj!

(Ŝi eksidas sur tabureton ĉe la balustrado kaj rigardas lin atente.)

SOLNESS

(ĵetas sian ĉapelon sur la tablon) Vi ja scias, ke la unua pri kio mi komencis, estis preĝejoj konstruaĵoj.

HILDE

(kapsignas) Mi bone scias.

SOLNESS

Ĉar mi, vidu, kiel knabo mi venis el pia hejmo en la kamparo. Kaj tial ŝajnis al mi, ke tiu preĝeja konstruado estas la plej digna, kiun mi povus elekti.

HILDE

Jes — jes.

SOLNESS

Kaj tion mi kuraĝas diri, ke mi konstruis tiujn etajn, malriĉajn preĝejojn kun tiel honesta kaj varma kaj kora animo, ke — ke —

HILDE

Ke —? Nu?

SOLNESS

Jes, ŝajnis al mi, ke li povus esti kontenta pri mi.

HILDE

Li? Kiu li?

SOLNESS

Li, kiu havus la preĝejojn, kompreneble! Li, por kiu ili servus al honoro kaj laŭdo.

HILDE

Ĉu tiel! Sed ĉu vi certas, ke — ke li ne estis — tiel — kontenta pri vi?

SOLNESS

(malestime) *Li kontenta pri mi!* Kiel povas vi tiel paroli, Hilde? Li, kiu permesis al la trolo en mi brui laŭ propra volo. Li, kiu ordonis al ili ĉeesti nokte kaj tage por servi min, — al ĉiuj tiuj — tiuj —

HILDE

Diabloj —

SOLNESS

Jes, ambaŭ specoj. Ho ne, mi devis senti, ke li ne estas kontenta pri mi. (mistere) Komprenu, ke tial vere li igis forbruli la malnovan domon.

HILDE

Ĉu tial?

SOLNESS

Jes, ĉu vi ne komprenas? Li volis doni al mi eblecon fariĝi majstro en mia fako — kaj konstrui ankoraŭ pli honorindajn preĝejojn por li. Unue mi ne komprenis kien li volis. Sed jen subite eklumiĝis por mi.

HILDE

Kiam tio okazis?

SOLNESS

Tio okazis kiam mi konstruis la preĝejturon norde en Lysanger.

HILDE

Tion mi suspektis.

SOLNESS

Ĉar, vidu Hilde, tie norde en la fremda loko, *tie* mi konstante pensadis kaj cerbumis en mi mem. Jen mi vidis kial li forprenis de mi miajn infanojn. Estis por ke nenio malhelpu min. Ne tiaĵoj kiel amo kaj feliĉo, komprenu. Mi devis nur esti konstruestro.

Nenio alia. Kaj mian tutan vivon mi devis konstrui por li. (ridas) Sed el *tio* tamen nenio fariĝis.

HILDE

Kion vi do faris?

SOLNESS

Unue mi esploris kaj provis min mem —

HILDE

Kaj poste?

SOLNESS

Poste mi faris la *neeblan*. Mi kiel *li*.

HILDE

La neeblan?

SOLNESS

Neniam antaŭe mi eltenis grimpi alten kaj libere supren. Sed tiun tagon mi kapablis.

HILDE

(eksaltas) Jes, jes, vi kapablis!

SOLNESS

Kaj kiam mi staris tie tute supre kaj pendigis la florkronon sur la pinton, mi diris al li: Aŭskultu nun, vi potenculo! De nun mi volas esti libera konstruestro, ankaŭ mi. En mia fako. Kiel vi en la via. Neniam plu mi volas konstrui preĝejojn por vi. Nur hejmojn por homoj.

HILDE

(kun grandaj brilaj okuloj) *Tio* estis la kanto, kiun mi aŭdis tra la aero!

SOLNESS

Sed li elpensis ion poste.

HILDE

Kion vi aludas per *tio*?

SOLNESS

(rigardas ŝin malĝoje) Konstrui hejmojn por homoj, — ne valoras ŝilingon, Hilde.

HILDE

Ĉu *tion* vi diras nun?

SOLNESS

Jes, ĉar nun mi vidas. La homoj ne bezonas siajn hejmojn. Ne por esti feliĉaj, ne. Kaj ankaŭ mi ne bezonus tian *hejmon*. Se mi iun posedus. (kun silenta, amara rido) *Jen* la tuta aranĝo, tiel longe, tiel longe kiel mi vidas malantaŭen. Vere nenio konstruita. Eĉ nenio oferita por ion konstrui. Nenio, nenio — ĉio.

HILDE

Kaj nenion vi volas konstrui ekde nun?

SOLNESS

(vigle) Jes, ĝuste nun mi volas komenci!

HILDE

Kion do? Kion do? Diru tuj!

SOLNESS

La sola en kiu mi kredas ke kuŝas homa feliĉo, *tion* mi volas nun konstrui.

HILDE

(rigardas lin firme) Konstruestro, — nun vi pensas pri niaj aerkasteloj.

SOLNESS

La aerkasteloj, jes.

HILDE

Mi timas, ke vi kaptuniĝus antaŭ ol ni atingus duonvoje.

SOLNESS

Ne kiam mi povas iri manon en mano kun *vi*, Hilde.

HILDE

(kun aspekto de subpremata kolero) Nur kun mi? Ĉu ne pluraj kuniros?

SOLNESS

Pri kiuj aliaj vi pensas?

HILDE

Ho, — ŝi, tiu Kaja ĉe la pupitro. Povrulino, — ĉu vi ne ankaŭ kunprenos ŝin?

SOLNESS

Hoho. Ĉu estis pri ŝi, ke Aline sidis ĉi tie babilante kun vi.

HILDE

Ĉu estas tiel aŭ ĉu ne?

SOLNESS

(impete) Mi ne respondas pri tiaĵo! Vi plene kaj tute kredu min!

HILDE

Dum dek jaroj mi kredis tute, tute pri vi.

SOLNESS

Vi daŭre kredu pri mi!

HILDE

Do lasu min vidi vin libera alte supre!

SOLNESS

(peze) Ho, Hilde, — tiel por ĉiutaga uzo mi ne estas.

HILDE

(pasie) Mi volas! Mi volas! (petante) Nur unu solan fojon ankoraŭ, konstruestro! Faru la *neeblan* denove!

SOLNESS

(staras ŝin profunde rigardante) *Se* mi tion provas, Hilde, mi volas stari tie supre al li parolante kiel la pasintan fojon.

HILDE

(en kreskanta intenseco) Kion vi diros al li.

SOLNESS

Mi diros al li: Aŭskultu min, potenca majstro, — juĝu pri mi laŭ via bontrovo, kiel al vi plaĉas. Sed de nun mi nur konstruos la plej delikatan en la mondo —

HILDE

(en ravo) Jes — jes — jes!

SOLNESS

— konstruos kune kun princino, kiun mi amas —

HILDE

Jes, diru tion al li! Diru tion al li!

SOLNESS

Jes. Kaj poste mi diros al li: Nun mi iros malsupren kaj ĉirkaŭbrakos ŝin kaj kisos ŝin

—

HILDE

— multajn fojojn! Diru tion!

SOLNESS

— multajn, multajn fojojn mi volas diri.

HILDE

Kaj jen —?

SOLNESS

Jen mi volas svingi mian ĉapelon — kaj iri malsupren al la tero — kaj fari kiel mi al li diris.

HILDE

(kun etendata mano) Nun mi revidas vin, kiel tiun fojon kiam estis kantado en la aero!

SOLNESS

(rigardas ŝin kun klinata kapo) Kiel vi fariĝis tia, kia vi estas, Hilde?

HILDE

Kiel vi faris min tia, kia mi estas?

SOLNESS

(mallonge kaj firme) La princino *havu* sian kastelon.

HILDE

(ĝojkrie, manfrapas) Ho, konstruestro —! Mia delikata, delikata kastelo. Nia aerkastelo!

SOLNESS

Kun fundamento sube.

(En la strato kolektiĝis **multaj homoj**, kiuj nur malklare vidiĝas inter la arboj. Muziko el blovinstrumentoj aŭdiĝas de fore malantaŭ la nova domo)

(**SinJORINO Solness**, kun peltkolumo, **doktoro Herdal**, kun ŝia blanka ŝalo sur la brako, kaj kelkaj sinJORINOJ venas sur la verandon. **Ragnar Brovik** samtempe venas de la ĝardeno.)

SINJORINO SOLNESS

(al **Ragnar**) Ĉu estu ankaŭ muziko?

RAGNAR

Jes. Estas la asocio de la konstrulaboristoj. (al **Solness**) Mi diru de la laborestro, ke li nun staras preta por supreniri kun la florkrono.

SOLNESS

(prenas sian ĉapelon) Bone. Mi mem venos.

SINJORINO SOLNESS

(time) Kion vi volas tie, Halvard?

SOLNESS

(abrupte) Mi devas esti tie sube kun la laboristoj.

SINJORINO SOLNESS

Jes, sube, jes. Nur sube.

SOLNESS

Mi ja kutimas. Tiel labortage.

(Li malsupreniras la ŝtuparon kaj for tra la ĝardeno.)

SINJORINO SOLNESS

(vokas post lin super la balustrado) Sed nepre petu la viron, ke li estu singardema, kiam li supreniros! Promesu tion, Halvard!

DOKTORO HERDAL

(al **sinjorino Solness**) Jen vidu ke mi pravas! Li ne plu pensas pri tiuj stultaĵoj.

SINJORINO SOLNESS

Ho, tio malpezigis! Du fojojn viroj falis por ni. Kaj ambaŭ mortis surloke. (turnas sin al **Hilde**) Dankon al vi, fraŭlino Wangel, ke vi retenis lin tiel firme. *Mi* certe ne estus povinta.

DOKTORO HERDAL

(gaje) Jes, jes, fraŭlino Wangel, vi ja kapablas reteni kiun ajn firme, se vi vere volas, vi!

(**Sinjorino Solness** kaj **doktoro Herdal** iras al la **sinjorinoj**, kiuj staras pli proksime al la ŝtuparo rigardante tra la ĝardeno. **Hilde** restas staranta ĉe la balustrado antaŭe. **Ragnar** iras al ŝi.)

RAGNAR

(kun subpremata rido, duone mallaŭte) Fraŭlino, — vi vidas la junajn homojn malsupre sur la strato, ĉu?

HILDE

Jes.

RAGNAR

Estas la kamaradoj, kiuj volas rigardi la majstron.

HILDE

Kial volas ili *lin* rigardi?

RAGNAR

Ili volas vidi, ke li ne kuraĝas suprengrimpi sur sian propran domon.

HILDE

Ĉu *tion* ili volas, tiuj knaboj!

RAGNAR

(kolere kaj moke) Li subpremis nin sufiĉe longe, li. Nun ni volas vidi ke ankaŭ *li* devas teni sin sube.

HILDE

Tion vi ne vidis. Ĉi tiun fojon ne.

RAGNAR

(ridetas) Ĉu? Kie ni do vidis lin?

HILDE

Alte, — alte supre ĉe la pinto vi vidis lin!

RAGNAR

(ridas) Lin! Kredu tion!

HILDE

Li *volas* al la supro. Kaj do vi lin tie vidis.

RAGNAR

Jes, li *volas*, jes! Tion mi volonte kredas. Sed efektive li ne *povas*. Kaptuniĝus por li longe, longe antaŭ ol li atingus duone. Li devus reen rampi malsupren sur manoj kaj genuoj.

DOKTORO HERDAL

(montras eksteren) Vidu! La laborestro supreniras la ŝtuparegojn.

SINJORINO SOLNESS

Kaj li ja havas la florkronon por porti. Ke li nun estu singarda!

RAGNAR

(ekrigardas dubeme kaj krias) Sed estas ja —!

HILDE

(krias en ĝojego) Estas la konstruestro mem!

SINJORINO SOLNESS

(ekkrias en timo) Jes, estas Halvard! Ho, granda Dio —! Halvard! Halvard!

DOKTORO HERDAL

Tŝ! Ne kriu al li!

SINJORINO SOLNESS

(duone senrega) Mi volas al li! Prenu lin malsupren!

DOKTORO HERDAL

(retenas ŝin) Ĉiuj staru senmove! Eĉ ne sono!

HILDE

(senmova, sekvas **Solness** per la okuloj) Li iras supren, supren. Ĉiam pli supren. Ĉiam pli supren! Vidu! Vidu nur!

RAGNAR

(senspire) Nun li *devas* turni. Ne eblas io alia.

HILDE

Li grimpas supren, supren. Baldaŭ li estos tute supre.

SINJORINO SOLNESS

Ho, mi mortos pro timo. Mi ne eltenas la vidon!

DOKTORO HERDAL

Do ne rigardu lin, vi.

HILDE

Jen li staras sur la plej superaj tabuloj! Tute supre!

DOKTORO HERDAL

Neniu movu sin! Ĉu vi aŭdas!

HILDE

(ĝojas en silenta ĝuo) Fine! Fine! Nun mi denove vidas lin granda kaj libera!

RAGNAR

(kvazaŭ senvoĉa) Sed tio estas ja —

HILDE

Tia mi vidis lin dum la dek jaroj. Kiel memfide li staras! Tamen terure ekscite.
Rigardu lin! Nun li pendigas la florkronon sur la turpinton!

RAGNAR

Estas kvazaŭ rigardi ion neeban.

HILDE

Jes, *estas* ja la *neebla*, tio, kion li nun faras! (kun nedifinebla esprimo en la okuloj) Ĉu vi
vidas iun alian tie supre ĉe li?

RAGNAR

Estas neniu alia.

HILDE

Jes, estas iu kun kiu li kverelas.

RAGNAR

Vi eraras.

HILDE

Ĉu vi eĉ ne aŭdas kanton en la aero?

RAGNAR

Devas esti la vento en la arbokronoj.

HILDE

Mi aŭdas kanton. Fortan kanton! (krias en sovaĝa ĝojo) Vidu, vidu! Nun li svingas la
ĉapelon! Li salutas al ni sube! Ho, salutu do supren al li. Ĉar nun, nun estas
finite! (tiras la blankan ŝalon for de la doktoro, svingas ĝin kaj krias supren) Vivu la konstruisto
Solness!

DOKTORO HERDAL

Ne faru! Ne faru! Pro Dio —!

(La **sinjorinoj** sur la verando svingas poŝtukojn kaj oni huraas malsupre en la strato. Subite mutiĝas, kaj la homamaso transsaltas al krio de teruro. Homa korpo kune kun tabuloj kaj pecoj de lignaĵo vidiĝas inter la arboj fali malsupren.)

SINJORINO SOLNESS KAJ LA SINJORINOJ

(samtempe) Li falas!

(**Sinjorino Solness** ŝanceliĝas, faletas senforta malantaŭen kaj kaptiĝas de la sinjorinoj sub krioj kaj konfuzo.)

(La homamaso sur la strato rompas la barilon kaj sturmas en la ĝardenon. Ankaŭ **doktoro Herdal** rapidas tien. Mallonga paŭzo)

HILDE

(fikse rigardas supren kaj diras kvazaŭ ŝtoniĝinta) *Mia konstruestro.*

RAGNAR

(apogas sin treme al la balustrado) Li certe estas frakasita. Mortigita surloke.

UNU EL LA SINJORINOJ

(dum oni portas **sinjorinon Solness** en la domon) Kuru al la doktoro —

RAGNAR

Mi ne povas movi piedon —

ALIA SINJORINO

Voku do iun tie sube!

RAGNAR

(provas voki) Kiel estas? Ĉu li vivas?

VOĈO

(el la ĝardeno) Konstruestro Solness estas morta!

ALIAJ VOĈOJ

(pli proksime) La tuta kapo frakasita. — Li falis rekte en la ŝtonejon.

HILDE

(turnas sin al Ragnar kaj diras silente) Nun mi ne plu vidas lin tie supre.

RAGNAR

Terure. Li tamen ne kapablis.

HILDE

(kvazaŭ en silenta, freneza triumfo) Sed tute al la supro li atingis. Kaj mi aŭdis harpoj en la aero. (Ŝi svingas la ŝalon supren kaj krias en sovaĝa ardo) Mia, — mia konstruestro!

*** END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK KONSTRUESTRO SOLNESS ***

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE